

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 1/2006 ★ ISSN 0032-2431

Jan J. Twardowski

POR TUJ EKVIDI

Do tiel longe oni devigas lerni prudenton
je demandoj logike respondadi
ne diradi sence kaj malsaĝe
por tuj ekvidi
ke espero povas esti apud malespero
malkredo apud kredo
infana laĉilo surplanke apud ĉerko
altrangulo apud porkidulo
vero kun fingro surbuŝe
prizorgito sub radoj de aŭtoambulanco
preĝo apud trista kotleto sur telero
kaj tiu krio ne mortu ne foriru ankoraŭ
mi montros al vi koron
kun kiu mi forkuradis – apud silento.

1

2006
Jubilea jaro

Enhavtabelo:

3	Re(d)akcie... <i>Kazimierz Leja</i>
4	El Pola Antologio – Władysław Stanisław Reymont – lia verko kaj vivo. <i>Tomasz Chmielik</i>
10	W.S. Reymont – La promesita lando <i>Tomasz Chmielik</i>
15	Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne! <i>Detlev Blanke</i>
19	La ludoj, kiujn ludas la „esperantistoj” <i>Thierry Salomon</i>
21	La malkvieta vivo de Lejzorĉjo Rojtsvanco <i>Ilja Erenburg / Saša el Rusujo</i>
26	Pintumi Pinterece <i>Multlegulo</i>
28	La kukuludo <i>Paweł Janowczyk</i>
29	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ĈIRKAŬ <i>Czesław Baranowski</i>
31	Sciigoj kaj leteroj de niaj legantoj

Kovrilpaĝe: „Por tuj ekvidi”
Jan J. Twardowski / Stanisław Śmigielski.

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 1/2006 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (naklad): 250 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia Ligęza. Konstantaj kunlaborantoj: Czesław Baranowski, Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław Śmigielski.

Ĉiujn korespondadojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al: Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6 EUR. Nrepre informu eldonejon pri via pago!

Re(d)akcie...

*Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.*

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.*

Kiam falas muroj, homoj estas esperoplenaj, atendantaj pli bonan sorton, pli bonajn rilatojn kun ekstermuroj estaroj...

Tian esperon havis popoloj de t.n. Orienta Eŭropo, kiam estis falanta la „Berlina muro” kaj efektive tiu falo alportis novajn eblecojn kaj novan sorton por multaj. Tiu falo kaŭzis demokratiajn ŝanĝojn en multaj landoj, konsekvence de kio popoloj liberiĝis de ŝtata tiraneco, malfermiĝis la okuloj de homoj, por kiuj ĝistiam „unu-nura vero”, servata de tiranoj, okazis absurda kaj falsa.

Vivante en libera lando de dekkelkaj jaroj, mi tamen plu revas pri falo de muroj aliaj, nun konstrua(i)taj, inter aliaj popoloj de la mondo; sufiĉus listigi tiujn, kies rezulto estas ribeloj, strikoj kaj eĉ militoj. Kiu komprenos la homan naturon, celanta – ofte eĉ pro religiaj kaŭzoj – subordigi aliajn homojn, popolojn, naciojn?

Mi pensas do pri tiuj muroj plej gravaj, forte starantaj interne de homo, kiuj nomiĝas: envio, ĵaluzo, insultoj, emo prisilentadi aŭ falsigi la faktojn. Ili bedaŭrinde ne mankas ankaŭ inter ni, esperantistoj, kiuj pri paca

kunestado de homoj tiom ŝatas babilu aŭ diskuti.

Kiel promesite al niaj legantoj, *Pola Esperantisto* ne okupiĝas pri atakoj kontraŭ konkretaj personoj, eĉ tiam, kiam aliaj fontoj tion faras (ili ja ne mankas). Ni tamen ne silentas, kvazaŭ nenio okazus (kio estas maniero de kelkaj), kiam internaciaj fontoj okupiĝas pri iu pola afero. Ni simple indikas tiujn fontojn por eventuala memstara esplorado. Esperantistaj aferoj devas esti gravaj por esperantistoj, kaj por tio ni instigos niajn legantojn.

La „Jubilea Jaro” de *Pola Esperantisto* komenciĝis per personaj akuzoj, vulgare insultoj kaj misinformado pri kvazaŭa neekzisto de nia revuo! Ni ne intencas ilin reciproki, por ne identiĝi kun mensa nivelo de ties aŭtoroj.

Preskaŭ perdinte la esperon, ke pola „infereto” iam ajn finiĝos, ni dediĉas niajn paĝojn al tiuj, kiuj volas agi pace, kreski intelekto kaj lingve, kunlabori anstataŭ batali – plenumante nian laboron plej bone kaj interese por niaj legantoj.

Kiel ĉiam – viaj opinioj kaj kunlaboro estas de ni atendataj! ❁

El Pola Antologio

Kun ĝojo kiel prezidanto de la Redakta Komitato de *Pola Antologio* mi povas sciigi la vi, karaj legantoj, ke iom post iom formiĝas grupo de la tradukantoj, kiuj jam baldaŭ kunigos siajn klopodojn por efektiviĝi ĉi verkon.

Sian pretecon kunlabori kun ni esprimis: Danuta Kowalska, Stanisław Śmigielski, Dorota Burchard kaj Urszula Zybur. Dankon pro via apogo! Ni esperas, ke aliĝos al ni aliaj personoj. Ni kalkulas pri helpo de Kris Long. Ni ne forgesas pri Wojciech Usakiewicz kaj Grzegorz Turbański. Ni rememoras elstarajn tradukintojn: Tadeusz Chodakowski, Jerzy Grum kaj Tyburcjusz Tyblewski, kiuj bedaŭrinde jam forpasis. Iliaj tradukoj certe ne mankos en nia *Antologio*.

Ni do malfermas la rubrikon *El Pola Antologio*, en kiu vi trovos antaŭĝuon kaj antaŭfrandon de tio, kio estas nun tradukata kaj prilaborata. Estus dezirinde, ke la rubriko allogu ĉiujn literaturamantojn. Ni atendas viajn kritikojn – eĉ se mallaŭdajn kaj vipajn, sed ankaŭ konsilojn, sugestojn.

En majo okazos la unua kunveno de la Redakta Komitato en la pitoreska urbeo Kazimierz ĉe Vistulo. Ĝis la renkontiĝo ni volus ekscii, kion kaŝas la tirkestoj de la tradukintoj kaj tradukantoj. Ĉiuj tradukontoj prezentu siajn proponojn. Tiuj, kiuj jam anoncis sin pretaj kunlabori, jam baldaŭ ricevos informan materialon.

La rubriko *El Pola Antologio* estas malfermita por niaj kunlaborantoj.

Tomasz Chmielik

Tomasz Chmielik

Władysław Stanisław Reymont – lia verko kaj vivo

Władysław Stanisław Reymont (ĝuste Stanisław Władysław Rejment) naskiĝis la 7an de majo 1867 en la vilaĝo Kobile Wielkie apud Radomsko. Li estis filo de vilaĝa orgenisto. Plej verŝajne ĉirkaŭ 1888 li ŝanĝis la nomon je Reymont, ĉar tiel li subskribadis de 1889 siajn leterojn. Jarojn de la frua infanaĝo li pasigis en Tuszyn.

De 1880 li estis ligita kun Varsovio. Tie li estis lernanta kudradon, ĉe sia bofrato, tajloro. En 1883 li ricevis unusolan konatan ateston el la 3-a klaso de Varsovia Metiista Dimanĉa Lernejo. En 1884 li fariĝis tajlora submajstro. Dum tri postaj jaroj li aliĝis al trupoj da migrantaj aktoroj kaj prezentiĝis sur la scenjejoj kun pseŭdonomo Urbański.

En 1888 li komencis laboron sur la fer-vojo Varsovia-Viena (en Rogów, Krosnowa, Lipce).

Ĉirkaŭ 1890 en Ĉenstoŭovo li ekligis rilatojn kun spiritistoj, kio forte influos lian psikan vivon kaj postan verkaron. Decembre de 1893 li transloĝiĝis al Varsovio, kie li okupiĝis nur pri literaturo. En 1894 kiel korespondanto de *Tygodnik Ilustrowany* (Ilustrita Semajnevuo) li pilgrimis al la Hela Monto en Ĉenstoŭovo, okaze de la centa datreveno de la Insurekcio de Tadeusz Kościuszko. Lia moderna raporto *Pielgrzymka do Jasnej Góry* (Pilgrimado al la Hela Monto, 1895), la unua en la pola literaturo, diskonigis la nomon de Reymont inter legantoj.

En 1895 li forveturis kun la familio de sia bofrato Jakimowicz al Italujo. En 1896 li restadis en Lodzo kolektante materialojn por sia romano *La promesita lando* (Ziemia obiecana). Li vizitis ankaŭ Berlinon, Brukselon, Londonon. Li estis multe vojaĝanta kaj ofte ŝanĝis restadlokon. En 1897 li pasigis kelkajn monatojn en Parizo. En 1900 li estis grave vundita en fervoja akcidento apud Varsovio. Neniam li resaniĝis plene, sed la ricevita kompenso (40 mil rubloj) rimarkinde plifaciligis lian vivon.

En 1902 li edziĝis kun Aurelia Szabłowska kaj ambaŭ forveturis al Francujo. Tie, en Bretonio, li estis laboranta pri sia plej fama romano *Chłopi* (Kamparanoj). La revolucion de la jaroj 1905-1906 li travivis en Varsovio. Ankaŭ dum la unua mondmilito li restadis tie, verkante kaj partoprenante agadon de civitanaj komitatoj. En 1917 li fariĝis prezidanto de Varso-

via Komitato de Antaŭzorgo kaj Hel-po por Verkistoj kaj Ĵurnalistoj, el kiuj baldaŭ fondiĝis Asocio de Verkistoj kaj Ĵurnalistoj, ankaŭ prezidata de li. Poste, kiam Polujo sendependiĝis, du fojojn (en 1919 kaj en 1920) li forveturis al Usono laŭ invito de polaj elmigrintoj. En 1920 li aĉetis malgrandan bienon Kołaczkowo proksime al Września (Poznano). Nun troviĝas ĉi tie la Reymonta muzeo. Li estis unu el la plej aktivaj subtenantoj de ideo pri la fondo de Pola Akademio de Literaturo. Multe interesis lin filmarto kaj ĝiaj eb-lecoj. Li ne mankis inter la fondintoj de la unua pola kooperativo pri kinematografio. En 1924 li ricevis la Nobel-premion por sia romano *Chłopi*.

Li mortis la 5an de decembro 1925 en Varsovio kaj oni entombigis lin sur la tombejo Powązki.

Siajn unuajn dekelkajn rakontojn li skribis inter 1892-1894, el kiuj kvar – *Suka* (Hundino), *Śmierć* (Morto), *Zawierucha* (Neĝblovado), *Tomek Baran* (Toĉjo Baran) – rakontas pri la vivo de kamparanoj. La aliaj okazas en la urbo – *W aptece* (En la apoteko), *Na bruku* (Sur la pavimo), *Cień* (Ombro), inter fervojistoj – *Pracy!* (Laboron!), aktoroj – *Franek* (Franĉjo), *Adeptka* (La adeptino) kaj nobeloj – *Idylla* (Idilio), *Spotkanie* (Renkontiĝo).

Inter tiuj literaturaj primicoj de Reymont oni trovas la rakontojn, kiuj per siaj temoj montras ĉiujn vivosferojn, kiujn Reymont penetros pli vaste kun propraj spertoj kaj personaj travivaĵoj.

Siajn verkojn el la jaroj 1891-1896 – la romanojn *Komediantka* (La komediantino) kaj *Fermenty* (Fermentoj) Rey-

mont dediĉis al la vivo de aktoraj trupoj. Por la unua fojo en la pola literaturo tiel atentokapte li prezentis konflikton inter artisto kaj socio. Li priskribis la aktoran mondon kvazaŭ de interne. Tiel ekestis du ankoraŭ ne konataj tiutempe medio-romanoj kun aŭtobiografiaj elementoj. Amplekse li montris konflikton artisto-filistro, samtempe vipante per moko „filistron en artisto”. Malkovran- te la realan vivon de aktoroj kaj verkistoj, li detruis la miton pri la eksterordinara vivo de la bohemo.

Dum la jaroj 1895-1896 li estis laboranta pri la romano *La promesita lando*. Poste ĝi aperadis per felietonoj en la varsovia *Kurier Codzienny* (Ĉiutaga Kuriero, 1897-1898). En *La promesita lando* Reymont prezentas la panoramon de la vivo en la disvolviĝanta industria urbo Lodzo dum la naŭdekaj jaroj de la XIX jarcento. La okazaĵoj aludas verŝajne tn. „lodzan ribelon” el 1892 – strikon de 70 miloj da laboristoj, kiu estis sange disbatita de cara polico. Kompreneble Reymont ne povis diri tion rekte pro cenzuro. *La promesita lando* estas romano sen ĉefa heroo, ĉar en la historio de la kompanio de tri junaj fabrikantoj – polo-inĝeniero Karlo Borowiecki, germano Maks Baum kaj judo Moric Welt – estis prezentita la vivo de la tuta laboristaro, laŭ maniero nekonata ĝis nun en la pola literaturo. La sorton de la individuoj oni pritraktis kiel elementon de la sociaj aĵoj, kiuj kunfandiĝis kun la bildo de la fabrika urbo, kun la maŝin-mondo reganta super la mondo de la homoj.

Ĉiujn okazaĵojn Reymont montris laŭ la vivo de Borowiecki, kiu por ka-

riero oferas amon, riĉiĝas kaj nur tiam vidas, ke la mono ne donis al li feliĉon. En la unuan planon elŝoviĝas antagonismoj inter nacioj kaj raso, distingaj por la vivo en Lodzo, kie la tuta kapitalo troviĝas en la manoj de la germanaj kun judaj entreprenistoj („Lodzer- menschen”), kiuj gajnas milionojn kutime per kontraŭleĝa spekulado kaj sen komparto ekspluatas polajn laboristojn venantajn el la vilaĝoj ĉirkaŭe. Reymont montras formiĝon de la proletaro el kamparanoj, „liberaj dungitoj”, al kiuj post la cara proprieto en 1863, mankas pano en la kamparo.

Li prezentas ankaŭ tavolon da eksbienuloj, „elseligitaj”, riĉiĝantaj laŭ maniero nenepre honesta, kiel Borowiecki, aŭ kun peno vegetantaj, kiel liaj malpli elturniĝemaj samnacionoj. Sed tiuj figuroj estis priskribitaj laŭ ŝablono kaj sen klareco, per kiu distingigis mokataj germanoj kaj judoj. La Lodzan laboristaron Reymont montris en la komenca stadio, ankoraŭ ne organizitan laŭ la principo de klasaj konscio kaj batalo, sed prefere en la momento, kiam komenciĝas la unuaj klopodoj pri ara protesto kontraŭ kapitalista subpremado.

La titolo de la romano montras ironion, ĉar ĝi ne prezentas la landon promesitan, sed malbenatan, ĝi prezentas apokalipsan vizon de la urbo-monstro, kiu frakasas homojn kaj estas loko por kruelega vivo-batalo. Tial la Reymonta bildo de Lodzo estas proksima al la opinioj de naturalistoj, kiel E. Zola, sed ankaŭ samas kun la opinio de J. Ruskin, kun lia protesto kontraŭ avida diskresko de industrio kaj ĝia pe- reiga influo sur la homan kulturon.

La mondfama pola reĝisoro, Andrzej Wajda, filmigis la romanon en 1975. Ĝi estis tradukita en 15 lingvojn, ankaŭ en Esperanton (Tomasz Chmielik, 2003).

Post *La promesita lando* Reymont skribis rakontojn, kiuj estis kvazaŭ ekzerco por la verkota epopeo *Chłopi* – *W jesienną noc* (En aŭtuna nokto) kaj *Sprawiedliwie* (Juste) – ambaŭ en 1899. Poste sekvas ciklo da rakontoj, kiujn kunigas la etoso de „strangeco” en vere malrealigita mondo. Ĝi komenciĝas per *En fumejo de l’ opio* (W palarni opium, 1894 en *Tygodnik Ilustrowany*), al kiuj aldoniĝas *Przed świtem* (Antaŭ tagiĝo, 1902) kaj *Komurasaki* (1903).

En 1900 li skribis la novelon *Sielanka* (Idilio), kiu estis unua el la verkoj kun revolucia fono, pro la kreskanta streĉo en la socio kaj konkretaj okazaĵoj (malkovro de la presejo de gazeto *Robotnik* (Laboristo) en Varsovio). En la ciklo da rakontoj ligitaj kun la jaro 1905 – *El la konstituciaj tagoj* (Z konstytucyjnych dni), *Czekam* (Mi atendas), *Na krawędzi* (Surrande), *Zabiłem* (Mi mortigis) – Reymont komencis per aprobo de la revolucia batalo, en kiu li vidis la „kvaran polan insurekcion”, kaj finas per timo antaŭ la revolucio kaj ĝiaj sekvoj en la socio. En la rakonto *Cmentarzysko* (La tombejo) li pentras apokalipsan vizion de la mondodetruo. Per la rakonto *Zabiłem*, skribita sub la influo de Dostojevskij, li atentigis pri interna batalo de revoluciulo, kiu devas mortigi provokanton. En la rakonto *Sąd* (Juĝo, 1896) li okupiĝas pri moralo de la vilaĝa komunumo, kiu kondamnas ŝtelistojn al morto. Kaj per la rakonto *Ave Patria* (1907) li kontraŭstarigas

revolucian fervoron al la apologio de batalo pri sendependeco. Samtempe li prezentis batalojn de uniatoj pri sia religio kaj nacia konscio – en la rakontoj: *Matka* (La patrino) kaj *Z ziemi chełmskiej* (El Ĥelmio).

Tamen en tiu ĉi tempo Reymont skribis la plej gravan kaj plej elstaran verkon – *Chłopi* (Kamparanoj). La romano, dividita en kvar volumojn, aperadis en *Tygodnik Ilustrowany* – vol. 1 (1902), vol. 2 (1903), vol. 3 (1905-1906) kaj vol. 4 (1908). La eventoj de la romano okazas en la vilaĝo Lipce sude de la malnova Loviĉa Princlando. Ĉiuj dialogoj estas skribitaj en dialekto, kaj krom la dialekto Reymont uzadis ankaŭ diversajn specojn de la pola literatura lingvo. En la romano li prezentis okazaĵojn el dek monatoj, kiuj komenciĝas fruaŭtune per pioĉado de terpomoj, kaj finiĝas venontjare per rikolto.

La eventoj de la romano lasas kunmeti sin en tri vicojn. Tiuj el la unua vico koncernas „ĉefajn heroojn kaj la tutan vilaĝan komunumon, kiu formas la fonon per diference elektitaj homtipoj: bienulo, pastro, orgenisto, vokto, muelisto, judo luanta drinkejon, mizeruloj kaj almozuloj, migranta profeto kaj popola instruisto – Roĥo, insurekciano el 1863 – Jakĉjo. Riĉulo-kamparano, Mateo Borina, ankoraŭ nemaljuna vidvo, edziĝas – spite al la volo de siaj gefiloj – kun Jagna, juna, ĉarma vilaĝa belulino, plena je seksardo. Tio elvokas malpaccon kun la plej aĝa filo Antoĉjo. Kune kun sia familio li esperis, ke li transprenos la bienon de la patro, dume li devas forlasi lian domon. La malpaco kreskas, ĉar Jagna fariĝis amatino de Antoĉjo,

kion malkovras Borina-patro. En la frua printempo okazas interbatiĝo pri arbaro inter la servistoj el la bieno kaj la vilaĝanoj, kiuj posedante tie partojn da arbaro pro servitudoj, ne volas allasi al forhakado de arboj. Antoĉjo defendas la patron kaj kune kun junaj kamparanoj el Lipce iras en malliberejon.

Fine de la printempo mortas Mateo Borina, kiu estis paralizita pro la interbatiĝo. Somere ĉiuj kamparanoj revenas hejmen. Indignante pro amaĵoj de Jagna ili forveturigas ŝin el la vilaĝo per ĉaro kun sterko. Tio signifas forpelon el la komunumo.

La historio de la vivo de Mateo Borina komenciĝas per lia pompa edziĝfestoj kaj finiĝas per la funebra regalo post lia morto. Tio formas la duan vicon da eventoj. Reymont priskribas la tutan vivo-jaron en la pola vilaĝo, kiu konsistas el diversaj festoj, ceremonioj kaj moroj akompanantaj naskiĝon, vivon kaj morton. Reymont ĉerpis tion el la eklezia kalendaro, kaj ankaŭ el la popolaj kredoj de la malnova tempo, kiuj konserviĝis en folkloro. En sia verko li prezentis majstre la popolan jaron da kutimoj, aŭguroj, superstiĉoj, familiaj solenaĵoj kun precipa teatro-kanta ritario. Tiu struktura tavolo de *Chłopi* memorigas laŭ la verkista intenco submetiĝon de individuo al la ordonoj kaj moralo de sia komunumo.

La eventoj el la tria vico fiksas tempopasadon, kiun esprimas senŝanĝe ripetiĝanta ritmo de jarsezonoj kaj monatoj kaj sekvo de laboroj en la kamparo, kiun decidas tiu natur-ritmo.

Reymont mastrumas la tempon en la romano per ampleksaj naturpriskri-

boj kun lirika agordo. Ili formas kvazaŭ kadrojn por la homaj aferoj en la romano, ili fariĝas por ili uverturo aŭ finalo. Preterlaso de iuj datoj, kiel ekzemple de la Novjara festo, des pli firme ankras la romanon en la tempofluo. Tiuj tri vicoj da eventoj havigis al la verko ĝian epikan karakteron, kiu konsistas en tio, ke ekzistas tie siaspeca gradigo: la sorto kaj aventuroj de ĉiu individuo dependas de la tuta komunumo kaj ĝiaj laboroj, kaj ĉio dependas de la naturo, tempo kaj biologio, manifestiĝanta en la homa ekzisto.

Tiun epopeon el la vivo de polaj kamparanoj oni tradukis malgraŭ la dialekto, uzata de Reymont, en 19 lingvojn. En 1973 Jan Rybkowski reĝisoris filmoserion por televido kaj kinofilmon laŭ *Chłopi*.

Inter 1904 kaj 1907 li skribis rakontojn post sia restado en Bretonio – *Burza* (Tempesto), *Teŝknota* (Sopiro), *Ostatni* (La lasta), kaj *Powrót* (Reveno), en kiuj li esprimis intereson pri homaj travivaĵoj kaj mara pejzaĝo. En *Burza* li majstre prezentas etoson de strangeco kaj teruro. *Teŝknota* kaj *Ostatni* enhavas tre bonan psikologian bildon de la virinoj, kiuj atendas revenon de siaj viroj el la maro, kaj tiu atendado elvokas ĉe ili psikan malsanon.

En la romana skizo *Marzyciel* (Revanto, 1908) Reymont helpis sin per la propraj spertoj el sia laboro kiel fervojo-gardisto. Li kunpuŝis la kvietan realon de malgranda stacio kun la realo, pri kiu revas ĝia heroo, kasisto, kies sopiro al la alia vivo devigas lin ŝteli monon kaj forkuri al Parizo. Elreviĝinta per tiu kontrasto inter siaj obsedaj revoj kaj

la realo ĉirkaŭe, li mortigas sin. Plene manifestiĝis ĉi tie la influo de Dostojevskij. Tiu rakonto, kiu montras la tutan aron da bonege priskribitaj figuroj, apartenas al unu el la plej eminentaj kaj forgesitaj verkoj de Reymont. En *Senne dzieje* (Songa historio, 1908) Reymont havigas grandan valoron al sonĝoj, sub la evidenta influo de psikanalizo. En la rakonto gravas la rolo de filmo, projekcio de vizioj, fragmenteco. *Dziwna opowieść* (Stranga rakonto, 1908) okupiĝas pri la sfero de parapsikologiaj aperaĵoj kaj mediumismo. Tio estis aŭguro por *Wampir* (Vampiro, 1911), malsukcesa romano, kie abundas bildoj el halucinoj kaj seancoj de spiritistoj.

Inter 1913 kaj 1918 aperis la historia trilogio – 1794, kiu devus esti – laŭ la verkista intenco – unua parto de la ampleksa verko, kiu kunigos la pasintecon kun la nuna tempo. La ideaj opinioj de Reymont, liaj politikaj sintezoj, ŝanĝiĝis dum la verkado. La formon de la trilogio decidis ankaŭ la unua mondmilito. Reymont skribis ĝuste ne romanon, sed grandan historian raporton, kiu estis frukto de lia diligenta laboro kaj profunda kono de la epoko.

Dum la 1a mondmilito Reymont skribis kelkajn rakontojn, el kiuj pleje gravas – *Orka* (Plugado) kaj *Dola* (La

sorto) el 1917 kaj *Echa* (Eĥoj) el 1918, kiuj plenigas la volumon *Za frontem* (Malantaŭ la fronto, 1919). La verkisto prezentis travivaĵojn de viktimoj kaj militistoj en pola vilaĝo. Preskaŭ en la maniero de la naturalistoj li skribas pri la teruraj scenoj, okazintaj tiam. En siaj romanoj kaj noveloj el la jaroj 1921-1924 li transformas siajn pensojn pri la restado en Ameriko. Ili ankaŭ provas doni ĝustan takson al la unuaj jaroj post la milito.

La verkaro de Reymont, riĉa laŭ kvanto kaj temoj, ne lasas valorigi sin unusignife. Krom la genia romano *Chłopi*, kiu post la ricevo de la Nobel-premio (1924) trovis firman lokon en la mondoliteraturo, estas ankaŭ multaj rakontoj, kiuj ne montriĝis provoj sukcesaj.

Verkoj en Esperanto: *Ave Patria*, trad. Leono Zamenhof, Varsovio 1909; *En fumejo de l' opio*, trad. Kazimierz Bein, Varsovio 1908; *La lasta*, trad. Kazimierz Bein, Paris 1910 (2a eld.: Varsovio 1965); *El la konsiliaj tagoj*, trad. Zetel, Paris 1910; *La promesita lando*, trad. Tomasz Chmielik, 2003 (nepublikita manuskripto).

Tomasz Chmielik

[red] De kvar jaroj Tomasz Chmielik estas tradukanta la romanon *Kampanaro*.

Bonvolu korekti la tekston de artikolo de Zofia Banet-Fornalowa: „Pola Esperantisto baldaŭ 100 jaraĝa! (PE 4/2005, paĝo 3, alineo 3). Devas esti:

Instigas min skribi por Pola Esperantisto ĉefe fakto, ke temas pri la revuo, kiu ekestis en naskiĝlando de Esperanto, ke forte ĝin subtenis ties kreinto dro L. Zamenhof, kiu dum kelka tempo eĉ estis ĝia konsilanto, kaj lia frato dro Leono Zamenhof dum kelkaj jaroj, kiun oni konsideras brila por PE ĝia ĉefredaktoro. Kontribuis al ĝi du aliaj Fratoj de dro Zamenhof Aleksandro kaj Felikso”.

La promesita lando

(Ziemia obiecana)

ĉapitro 1

Lodzo vekigis.

La unua tondra fajfo disŝiris silenton de la frua mateno, kaj poste el ĉiuj urbopartoj pli kaj pli laŭtigis aliaj kaj ili vokis raŭke, severe kiel koruso da monstraj kokoj, kriantaj per metalaj gorĝoj la signalon al laboro.

Tre grandaj fabrikoj, kies longaj, nigraj korpoj kaj sveltaj koloj-fumtuboj staris nokte, tra nebulo kaj pluvo – vekigis iom post iom, ŝprucigis flamojn de fajroj, ellasis fumonubojn, komencis vivi kaj movi sin en mallumo ankoraŭ kovranta la teron.

La pluveto, marta, miksitaj kun neĝo, falis senĉese kaj etendis super Lodzo pezan, alkroĉigeman vualon; ĝi tamburis ladajn tegmentojn kaj torentis rekte sur la trotuarojn, sur la stratojn nigrajn kaj marĉajn, sur la nudajn arbojn, enpremitajn en longajn murojn, tremantajn de malvarmo, puŝatajn per vento, kiu blovis de ie el la kampoj malmoliĝintaj kaj peze turnigis super la kotoplenaj stratoj, skuis fortege tabulbarilojn, batis la tegmentojn kaj falis en koton, kaj muĝis inter la branĉoj de la arboj, kaj frapis per ili fenestrovitrojn de malalta, teretaĝa domo, en kiu subite brilis lumo.

Borowiecki vekigis, flamigis kande-

lon kaj samtempe la horloĝo sonoris laŭte, montrante la kvinan.

– Mateo, teon! – li kriis al la eniranta lakeo.

– Ĉio estas preta.

– Ĉu la sinjoroj ankoraŭ dormas?

– Tuj mi vekos, se vi ordonos, direktoro, ĉar sinjoro Moric diris vespere, ke li volas hodiaŭ dormi pli longe.

– Iru kaj veku.

– Ĉu la ŝlosiloj estas prenitaj?

– Ŝvarc mem venis.

– Ĉu iu telefonis nokte?

– Estis Kunke, sed kiam li finis sian deĵoron, li diris nenion al mi.

– Kio okazas en la urbo? – li demandis rapide, kaj ankoraŭ pli rapide li vestis sin.

– Nenio, sed iu bruligis laboriston sur la Gajera Placo.

– Sufiĉos, nu, jam iru.

– Forbrulis ankaŭ la fabriko de Goldberg, ĉe la strato Brikeja. Nia fajrobrigado veturis, sed ĉio okazis bone, restis nur la muroj. El la sekigejo elsaltis flamoj.

– Kio ankoraŭ?

– Nenio, ĉio okazis *fajn, je glanc* – li ekridegis.

– Verŝu teon, mi vekos sinjoron Moricon. – Li vestiĝis kaj iris en la najba-

rajn ĉambrojn tra la manĝejo, kie lampo pendants ĉe la plafono ĵetis akran, blankan lumon sur la rondotablon, kovritan per tuko kaj taso, kaj sur la brilantan samovaron.

– Maks, la kvina, ellitiĝu! – li vokis, malfermante la pordon de la malluma ĉambro, el kiu blovis la sufoka aero kunodoro de violoj.

Maks ne respondis, nur la lito krakis kaj knaris.

– Moric! – li vokis en la alian ĉambron.

– Mi jam vekigiĝis. Dum la tuta nokto mi ne estis dormanta.

– Kial?

– Mi pensis pri tiu komuna negoco, iom mi kalkulis kaj tiel pasis la tempo.

– Sciu, ke hodiaŭ nokte forbrulis Goldberg, tute, je glanc, kiel diras Mateo.

– Por mi ne estas novaĵo – li respondis oscedante.

– De kie vi scias?

– Multon li asekuris...

– Kaj sian bilancon li egaligis.

Ambaŭ ekridis sincere.

Borowiecki revenis en la manĝejon kaj trinkis teon, kaj Moric, kiel kutime, serĉis en la tuta ĉambro diversajn vestaĵojn kaj insultis Mateon.

– Mi batos al vi grandan parton de via buŝaĉo, mi faros el ĝi ruĝan fusteton, se vi ne kunmetos por mi ĉion en ordo.

– Morgen! – kriegis la vekigiĝinta Maks.

– Ĉu vi ellitiĝos? Jam estas post la kvina.

La respondon sufokis fajfiloj, kiuj aŭdiĝis kvazaŭ super la tegmento kaj

ululis dekkelkajn sekundojn tiel laŭte, ke la vitroj tintis en la fenestroj.

Moric – nur en subvesto kaj kun palto sur la ŝultroj – sidigis antaŭ la forno, en kiu ĝoje krakis ŝtipetoj kun rezino.

– Vi ne eliros?

– Ne. Mi estis veturonta al Tomaŝovo, ĉar Vajs skribis al mi, ke mi venigu por li novajn kardilojn, sed mi ne vojaĝos nun. Estas malvarme kaj mi ne volas.

– Maks, ĉu ankaŭ vi restos hejme?

– Kien mi rapidu? En tiun aĉan budon? Cetere mi kverelegis hieraŭ kun mia patro.

– Maks, estos malbone, se vi kverelegos senĉese kaj kun ĉiuj! – murmuris grumble kaj severe Moric, disŝovante per stango la fajron.

– Ĉu tio interesus vin? – kriis la voĉo el la alia ĉambro

La lito krakegis impete kaj en la por-do stariĝis la granda figuro de Maks, nur en subvesto kaj pantofloj.

– Ĝuste pri tio mi tre interesiĝas.

– Lasu min en kvieto, ne kolerigu min. Karlo, vi vekis min – nur la diablo scias, kiucele – kaj li komencas jelpi.

Li parolis laŭte per la basa, tondra voĉo. Li malantaŭeniĝis en la ĉambron kaj post momento li elportis siajn vestaĵojn, ĵetis ĉion sur la tapiŝon kaj iom post iom vestis sin.

– Vi fuŝas al ni la negocon per viaj kvereloj – ekparolis Moric, premante okulvitrojn kun ora muntaĵo sur la maldikan, judan nazon, ĉar ili deglitis fojfoje.

– Kie? kion? kial?

– Ĉie. Hieraŭ ĉe Blumentaloj vi diris laŭte, ke la plimulto da niaj fabrikantoj

estas ordinaraĵoj ŝtelistoj kaj trompistoĵoj.

– Mi diris – ho, jes! – kaj ĉiam mi parolos tion. – Iu malŝata rideto traglitis sur lia buŝo, kiam li rigardis Moricon.

– Vi, Maks Baum, ne parolos, ĉar paroli tion vi ne povas, mi diras al vi.

– Kial? – li demandis mallaŭte kaj apogis sin al la tablo.

– Mi diras al vi, se vi ne komprenas min. Antaŭ ĉio, kion vi intencas? Tio interese estas vin, ĉu ili estas ŝtelistoj aŭ honestuloj? Ni ĉiuj estas en Lodzo nur tiucele, por fari *geŝefton*, por gajni multe da mono. Neniu el ni restos ĉi tie sen fino. Kaj ĉiu faras monon laŭ sia povo kaj kapablo. Vi estas ruĝa, kaj vi estas radikala, punco numero kvar.

– Mi estas honesta – li respondis grumble, verŝante teon por si.

Borowiecki kun kubutoj apogitaj sur la tablo, kaŝis la vizaĝon en siajn polmojn kaj aŭskultis.

Pro la aŭdigita respondo Moric turniĝis impete, ke la okulvitroj falis de la nazo kaj frapis apogilon de la seĝo, li rigardis Makson kun rideto de pika ironio sur la mallarĝa buŝo, li glatigis per maldikaj fingroj, sur kiuj flagris ringoj kun brilantoj, maldensan, peĉonigran barbon kaj flustris moke:

– Ne babilu, Maks, stulte. Grava estas mono. Tio estas grava, ke vi ne ĵetu akuzojn publike, ĉar ili povus malutili al nia kredito. Ni volas konstrui fabrikon trioje; ni havas nenion, krediton kaj fidon ni bezonas ĉe tiuj, kiuj donos ĝin. Ni ankaŭ bezonas esti honestaj, afablaj, agrablaj, bonaj. Kiam Borman diras al vi: „Aĉa Lodzo”, respondu, ke ĝi estas kvaroble pli aĉa... ni devas kapjesi al li, ĉar li estas dika

fiiŝo. Kaj kion vi diris pri li al Knol? Ke li estas malsaĝa krudulo. Homo, li ne estas malsaĝa, ĉar el sia cerbo li elprenis milionojn, tiujn milionojn havas li, kaj ni ankaŭ deziras tion. Ni parolos pri ili, kiam ni havos monon, kaj nun oni devas ŝnuri la buŝon, ni bezonas ilin; nu, Karlo diru, ĉu mi pravas – por mi ja gravas la estonteco de nia triojo.

– Moric tute pravas – diris Borowiecki severe, levante siajn malvarmajn, grizajn okulojn al la ekscitita Maks.

– Mi scias, ke vi pravas, jen la pravo lodza, sed ne forgesu, ke mi estas honestulo.

– Fraziaĵo! malnova, uzita fraziaĵo!

– Moric, vi estas malnobla judaĉo! – kriegis Baum.

– Kaj vi estas malsaĝa, sentimentala germano.

– Vi kverelas pri la vortoj – malvarme diris Borowiecki kaj komencis surmeti palton. – Mi bedaŭras, ke mi ne povas resti kun vi, sed komencas funkciadon nova presejo.

– Per kio finiĝis la hieraŭa interparolo? – jam kviete demandis Baum.

– Ni konstruos fabrikon.

– Jes, mi havas nenion, vi havas nenion, li havas nenion – Maks ekridis laŭte.

– Do, kune ni havas ĝuste tiom, kiom sufiĉos, por konstrui grandan fabrikon. Ĉu ni perdos? Ni povas ĉiam gajni monon – li diris post momento. – Cetere, aŭ ni faras negocon, aŭ ni jam ne faras negocon. Diru ankoraŭfoje.

– Ni faras, ni faras! – ripetis ambaŭ.

– Ĉu Goldberg forbrulis? – demandis Baum.

– Jes, li faris bilancon al si. Saĝa ho-

mo, li gajnos milionojn.

– Aŭ li finos sian vivon en malliberejo.

– Stulta vorto! – diris kolere la senpacienca Moric. – Tiel babilu en Berlino, Parizo, Varsovio, sed ne en Lodzo. Estas la malagrablaj vortoj, ŝparu tion al ni.

Maks diris nenion.

La fajfiloj denove laŭtigis penetreman, kolerigan vokon kaj ili kantis pli kaj pli tondre la matenan signalon.

– Nu, mi jam devas iri. Ĝis la revido, kunuloj, ne kverelu, enlitiĝu kaj sonĝu pri tiuj milionoj, kiujn ni faros.

– Ni faros!

– Ni faros! – ili diris kune.

Forte, amike ili premis siajn manojn.

– Ni skribu la hodiaŭan daton; ĝi estos tre memorinda por ni.

– Aldonu tie, Maks, krampon, se iu volos trompi la aliajn kiel la unua.

– Vi, Borowiecki, estas nobelo, vi havas sur la vizitkartoj vian blazonon, iam en prokuro vi metis von antaŭ la nomon, kaj vi estas la plej granda lodzermensch el ni – flustris Moric.

– Kaj vi ne estas?

– Pri tio mi ne bezonas paroli, ĉar mi bezonas gajni monon. Vi kaj germanoj estas bonaj nacioj, sed por babilado.

Borowiecki levis kolumon, zorge butonis la palton kaj eliris.

Senĉese pluvetis kaj akvogutoj vipis oblikve ĝis la mezo de la fenestroj en la dometoj, kiuj dense staris en tiu fino de la Piotrkova strato, nur kelkloke kvazaŭ dispuŝitaj per fabrika domego aŭ vidinda palaco de fabrikanto.

La vicoj da malaltaj tilioj sur la trotuaro fleksiĝis sub fortaj blovoj de la ven-

to, kiu hastis en la kotoplana, preskaŭ nigra strato, ĉar maldense starantaj lanternoj dissemis nur malgrandajn rondojn da flava lumo, en kiu brilis la nigra, glueca koto sur la strato kaj pasis centoj da homo, kurantaj tra granda silento, kun freneza rapido, post la voko de tiuj fajfiloj, kiuj nun pli kaj pli malofte ululas ĉirkaŭe.

– Ni faros? – ripetis Borowiecki, haltante kaj kroĉante sian rigardon al tiu kaoso da fumtuboj levigantaj en mallumo; al tiu nigra amaso da fabrikoj, rigidaj, sovaĝaj per iu ŝtona kvieto, kiuj staras ĉie kaj kvazaŭ elkreskas el ĉiuj flankoj antaŭ li per siaj ruĝaj, dikaj muroj.

– Morgen! – iu kriis al li, kurante antaŭen.

– Morgen... – li flustris kaj ekiris pli malrapide.

Turmentis lin duboj, miloj da pensoj, nombroj, supozoj kaj kombinoj bolis en lia kranio, li preskaŭ forgesis, kie li estas kaj en kiu direkto li iras.

Miloj da laboristoj, kiel mallaŭta, nigra svarmo, elrampis subite el la flankaj stratoj, kiuj aspektis kiel kanaloj plenaj de koto, el tiuj domoj, kiuj staras en la urbofinoj kiel grandaj rubejoj – ili plenigis la Piotrkovan straton per susuro de paŝoj, per laduoj brilantaj en lumo de lanternoj, per frapado de la plandumoj de siaj lignoŝuoj kaj ia dorma bruoj kaj per ŝmacado de koto sub la piedoj.

Ili elverŝiĝis en la straton, ili venis de ĉiuj flankoj, ili plenigis trotuarojn, ili starigis la pezajn paŝojn meze de la strato, plena je nigraj flakoj kun akvo kaj koto. Iuj haltis en malorda amaso ĉe la pordegoj de la fabrikoj, aliaj starantaj en longa vico malaperis en la pordegoj,

kvazaŭ iom post iom englutataj per la interno ŝpruciganta lumon.

En la malluma profundo disverŝiĝis lumo. La nigraj silentaj kvadratoj da fabrikoj subite disbrilis per centoj da flajmaj fenestroj kaj rigardis kvazaŭ per fajraj okulaĉoj. La elektraj lumoj pendis en ombroj kaj flagris en malpleno.

Blankaj fumoj saltis el la tuboj kaj volviĝis en tiu ŝtona arbarego, kiu per miloj da kolonoj kvazaŭ subtenis la nokton kaj kvazaŭ ŝanceliĝis en tremoj de elektra lumo. La stratoj malpleniĝis, oni estingis lanternojn kaj silentigis lastajn fajfilojn, la silento kun susuro de pluvo, kun pli kaj pli mallaŭtaj ventoblovoj, etendiĝis sur la strato.

Oni malfermis drinkejojn kaj bakejojn, kaj kelkloke, tra iu fenestreto en la mansardoj aŭ keletaĝoj, en kiujn enpremiĝis strata koto, brilis lumoj.

Nur en centoj da fabrikoj bolis vivo streĉanta fortojn, febrega; sufokita krakbruo de maŝinoj tremis en la nebula aero kaj kunpuŝiĝis kun la oreloj de Borowiecki, kiu senĉese promenis sur la strato kaj rigardis en la fenestrojn de la fabrikoj, tra kiuj vidiĝis nigraj figuroj de laboristoj aŭ gigantaj konturoj de maŝinoj.

Li ne volis iri al laboro. Estis bone al li tiel migri kaj pensi pri la konstruota fabriko, aranĝi ĉion, komenci ĝian funkciadon, gardi. Tiel li dronigis sin en tiujn revojn, ke plej klare li aŭdis ĉirkaŭ si kaj sentis la konstruotan fabrikon. Li vidis amason da ŝtofoj, oficejton, aĉetantojn, frenezan movon, kiu regas tie. Li sentis kvazaŭ grandan ondon da riĉaĝoj, kiu venas sub liajn piedojn.

Li ridetis malgraŭvole, liaj okuloj bri-

lis malseke, la pala belega vizaĝo ruĝiĝis per forta ĝojo. Nervoze li tuŝis la mentonon malsekan de pluvo kaj vekigiĝis el siaj pensoj.

– Ho, kia stultaĵo – li flustris malŝate kaj ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ pro timo, ĉu iu ne vidis tiun momentan feblon.

Estis neniu, sed jam griziĝis, el la maldensa, nebulplena mateno iom post iom elglitis konturoj de arboj, fabrikoj kaj domoj.

Sur la Piotrkova strato de la urbo-limo ruliĝis kolono da kampulaj ĉaroj, sur la kavoplenaj vojoj el Lodzo frapis radoj de grandaj budoĉaroj kun karbo kaj platĉaroj kun ŝpinaĵo, rulaĵoj da kotono, krudaĵo aŭ bareloj, inter kiuj preterhastis briĉkoj aŭ kaleŝetoj de fabrikantoj rapidantaj al siaj okupoj aŭ knare ŝanceliĝis droŝko kun malakurata oficisto.

En la fino de la Piotrkova strato Borowiecki iris maldekstren, en la mallarĝan straton sen pavimo, kun kelkaj lanternoj pendantaj sur ŝnuro kaj grandega fabriko, en kiu jam komenciĝis laboro. Ĉiuj fenestroj en la longa kvaretaĝa konstruaĵo estis plenaj de lumo.

Rapide li surmetis farboŝmiritan, malpuran bluzon kaj kuris al sia fako.

tradukis Tomasz Chmielik

Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne!

(La teksto aperis en *Libera Folio*. Sube ni publikigas sensanĝe – laŭ peto de la Aŭtoro – la tuton, kiel la unuan en la diskuto pri la temo. En la sekvontaj numeroj ni publikigos kontribuojn de aliaj fame konataj esperantistoj).

[Libera Folio]: Laŭ iuj kritikantoj de Esperanto, ekzemple reprezentantoj de la Eŭropa Komisiono, la lingvo ne taŭgas por seriozaj celoj ĉar mankas al ĝi kulturaj referencoj. Malmultaj esperantistoj dubas pri la ekzisto de esperanta kulturo, sed kia estas la ligo inter lingvo kaj kulturo? Por eviti konfuzon, nepras fari klaran distingon inter lingvo kaj ĝia parolkomunumo, opinias Detlev Blanke. „La problemo, estas, kiom da kulturelementoj ĝenerale estas ligitaj al Esperanto kaj kiom da ili estas ligitaj nur al ĝi. Ofte la diskutoj pri la temo estas ĵonglado inter rigora kaj metafora sencoj de tiu konstato”, li skribas.

Antaŭrimarkoj: Ĉiam denove oni trovas la aserton de neinformitoj, ke Esperanto ne havas kulturon. Ni scias pri la senbazeco de la asertoj kaj eble ne plu tre miras. Tamen, se foje ankaŭ informitoj asertas same, tiam la miro povas esti granda. En la germanlingva artikolo *Der Jargon des Esperanto-Weltbundes* (= „La ĵargono de UEA”), troviĝanta en antologio direktita al universitataj instruistoj de la germana lingvo, d-rino Alicja Sakaĝuchi

(profesorino en la Universitato Adam Mickiewicz Poznano/Pollando) asertas, ke Esperanto ne estas „portanto de iu kulturo”.

Alicja Sakaĝuchi ne estas iu ajn. Ŝi flue parolas Esperanton, edukis siajn du filojn en Esperanto (kun japana edzo, la familia lingvo estis/estas [ankoraŭ?] Esperanto), habilitiĝis (post vanaj klopodoj en Germanio) pri interlingvistiko en Poznano, multe verkis, ofte tute bone pri Esperanto. Tamen konscie ŝi tenas distancon al la lingvo-komunumo, apenaŭ partoprenas en ties aktivecoj, ofte malŝate komentas la agadon de „amatoroj” ktp. Mi longe observis tiun evolun. Sed finfine mi sentis min devigita reagi. En „Informilo por Interlingvistoj” (nro 54 [3/05]) mi analizis la konfuzan artikolon kaj donis germanajn citaĵojn kun tradukoj. La redaktoro de *Libera Folio*, Kalle Kniivilä lerte redaktis la escon de mia analizo, kiu aperos sube. La citaĵoj estas el la originala artikolo. Interesitoj povas ĝin peti de mi (dblanke.gil@snafu.de).

Detlev Blanke

Lige al la demando, ĉu Esperanto „havas” kulturon, ŝajne ekzistas baza miskompreno. Ĉu la germana lingvo „havas kulturon”, same la pola, angla, hungara ktp.? Rigorasence la respondo estas, ke lingvoj en si mem ne „havas” kulturon. Do sekve ankaŭ Esperanto ne „havas” kulturon. Metafore oni tamen ofte diras, ke tiu aŭ jena lingvo havas kulturon. Tiam Esperanto ja „havas” kulturon. Tamen la problemo, estas, kiom da kulturelementoj ĝenerale estas ligitaj al Esperanto kaj kiom da ili estas ligitaj nur al ĝi. Ofte la diskutoj pri la temo estas ŝonglado inter rigora kaj metafora sencoj de tiu konstato.

Ĝenerale estas akceptate, ke lingvo en si mem estas kulturaĵo. Do, Esperanto estas kulturaĵo. Kvankam neniu lingvo en si mem havas kulturon, tamen kulturon ja sendube havas la lingvo-komunumo, la parolantaro de lingvo. Ĝi havas/portas, konservas, pludonas sian kulturon aŭ foje eĉ detruas elementojn de ĝi (ekz. la nazioj en Germanio). Tiu kulturo reflektiĝas kaj konserviĝas en la difinita lingvo de diversaj grupiĝoj kaj estas eksciebla pere de ĝi. Tio ekz. povas koncerni jenajn lingve distingeblajn parolantarojn:

- regionlingva (dialekta) parolantaro kun sia kulturo (ekz. la bavara en suda Germanio)
- nacilingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la superregiona germana)
- minoritatlingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la regione limigita soraba en Germanio)
- enmigrintoj (ekz. turkoj en Germanio, ĉinoj kaj aliaj etnoj en Usono

ktp.), kiuj ofte loĝas en certaj gettoj aŭ specifaj kvartaloj (diversgrade) kunportas kaj flegas siajn lingvojn kaj kulturojn ktp.

Laŭ tio videblas, ke difinitaj homoj samtempe povas havi diversajn identecojn kun diversaj kulturspecifaĵoj. Persono X etne povas esti germano, regione kaj dialekte bavaro, politike verdulo, religie katoliko, ktp. Li/ŝi ankaŭ povas havi la identecon de esperantisto, senti sin eŭropano kaj tiel plu. Elementoj de tiuj diversaj kulturmedioj estas aktualeblaj depende de diversaj kunteksto- kaj kondiĉoj: socia, psika, situa, hommedia kaj aliaj.

Diverslingvaj, diversdevenaj, diverskleraj homoj, kiuj uzas Esperanton kaj vivas en ĝia lingvo-komunumo, spertas vole nevole la diversoriginan kulturon de tiu lingvo-komunumo, eble eĉ kontribuas al ties riĉigo (ekz. per tradukoj), kvankam tre malsame laŭ maniero, kvalito kaj intenseco.

Depende de la kultura nivelo, kiun havas la unuopaj parolantoj, tiu kulturo kun siaj elementoj povas esti konata, konscie flegata, pludonata al la infanoj, disvastigata ktp. Tio okazas plimalpli konscie profunde kaj intensive aŭ apenaŭ rimarkeble. Ekzemple intelektulo, kiu interesiĝas pri la partoj de la tradicia kulturo (literaturo, muziko, arto, teatro ktp.), evidente aktualigas pli da kulturaj tavoloj kaj elementoj ol homo, kiu ne interesiĝas pri ĉio ĉi. Tio kompreneble reflektiĝas en la uzata lingvaĵo de la difinitaj homoj kaj homgrupoj.

Se iuj germanoj ne interesiĝas pri diversaj fakoj, medioj de kulturo, ekz.

nek konas Faŭston nek modernan literaturon ktp., ili ne komprenos la specifan leksikon, la aludojn ligitajn al tiuj kulturaĵoj, la kunsencaĵojn (konotaciojn). Ĉu tio signifas, ke la germana lingvo-parolantaro ne konservas, reflektas tiajn kulturaĵojn, ne „havas” kulturon?

Parolante pri tio, ke lingvo (resp. ties komunumo) havas/ne havas kulturon, oni nenion diras pri la kvanto kaj kvalito de tiu kulturo, nek pri la grado de la originaleco. Se difinitaj parolantoj de Esperanto ne interesiĝas pri kulturaĵoj konservitaj en Esperanto (ekz. originala literaturo), nek pri la lingvo-komunumo kun siaj tradicioj, sia strukturo en pasinteco kaj nuno, ne sekvas la dinamikon de la lingvo-komunumo, la procezojn, konfliktojn, do la historion kaj simile, ne partoprenas la aktualan internacian vivon de la komunumo parole kaj skribe, do sekve ne uzas la leksikon ligitan al tiuj fenomenoj, ĉu tio signifas, ke la Esperanta lingvo-komunumo ne disponas pri tiuj fenomenoj?

Facile pruveblas, ke tiuj fenomenoj objekte estas konservataj (prikribataj) en la lingvo, ke iliaj specifaj reflektiĝas en ĝi, eĉ se subjektive oni ne interesiĝas pri ili. Ŝajne Eugen Wu-ester estis la unua, kiu abunde reflektis pri la lingvo-komunumo en sia Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, Leipzig, 1923-1929; (mi aliloke abundete verkis pri la vortaro en Esperanto kaj la germana).

Ĉiu lingvo estas parto de la homa kulturo. Sekve ankaŭ Esperanto. La homa kulturilata agado reflektiĝas

en la lingvo vertikale (agadspecoj) kaj horizontale (regionoj), do ene de difinita medio, en iu fako, organizaĵo ktp. sed ankaŭ en dialekta regiono, nacio (ŝtato), kontinento aŭ internaciskale. Sekve ankaŭ la kulturilata agado de Esperanto-parolantoj, resp. la rezultoj de tiu agado, reflektiĝas en la lingvo.

La difinita(j) lingvo(j) por la homo havas diversajn funkciojn: Per lingvo li/ŝi pensas, komunikas, emocias; akiras, konservas kaj pludonas sciojn, ekonomojn, spertojn ktp. En la plej multaj kazoj por la individuo la lingvo estas grava identigilo. Tio aparte validas rilate al kulturtemoj, sendepende de tio, kiom larĝa aŭ mallarĝa estas nia difino pri kulturo. Tiun funkcion evidente ankaŭ havas Esperanto.

En la supre menciita artikolo d-rino Alicja Sakaguchi (AS) klopodas argumenti, ke ne ekzistas aparta kulturo de Esperanto kaj ke la lingvaj ekzemploj, ofte menciitaj kiel esperantismoj, nur uzatas de oficistoj de la Centra Oficejo de UEA, resp. de UEA-aktivuloj. Tiuj esperantismoj laŭ ŝi formas specifan „ĵargonon de UEA” La „ĵergono” de UEA laŭ AS estas uzata en la Centra Oficejo de UEA kaj de la Komitato de UEA – de proksimume 80 personoj. Ege miriga aserto.

Estas konate, ke en ĉiuj ago-medioj uzatas specifaj stiloj (funkciaj stiloj), do ankaŭ en oficejoj de organizaĵoj, en redakcioj, gvidinstancoj ktp. aŭ en familioj. Tio ankaŭ koncernas Esperanton. Tamen tiuj stiloj neniam kovras la kompletan uzatan lingvaĵon. Pri la elekto de la stilelementoj decidis la situacio kaj la komunika celo.

Multaj el la menciitaj leksikaj ekzemploj por informitaj esperantistoj pruvas la malon de tio, kion la artikolo volas kredigi. Ili ligiĝas al la historio, strukturo, konceptoj, debatoj ktp. en la komunumo, ne nur en la Centra Oficejo. Tiun lingvaĵon uzas multaj esperantistoj, kiuj estas ligitaj al la lingvo-komunumo kun siaj specifajoj, kompreneble ne nur en CO, ne nur en la Komitato de UEA, sed ankaŭ ekster tiuj strukturoj. Ofte temas pri vortludoj, frazeologiaĵoj ktp. (pri tio valoras legi la libron de Sabine Fiedler Esperanta Frazeologio, eldonita de UEA en 2002 aŭ diversajn studojn de Aleksandro Melnikov, kiu antaŭ ne-longe habilitiĝis pri la temo).

AS skribas, ke „...Esperanto estas transetna, transnacia lingvo sen tradicioj, folkloro, vivostiloj kaj kondutmanieroj, kiuj karakterizas difinitajn popolojn. Ĉiu uzanto de Esperanto jam apartenas al difinita popolgrupo kaj povas identiĝi kun difinita etna kulturo kaj religio”.

Kiel dirite, Esperanto en si mem ne „havas” tion kaj jenon, nek tradiciojn, vivstilon, kondutmanieron ktp. Sed la lingvo-komunumo ja havas, kvankam ne homogene, ne unuece. Ke Esperanto-uzanto apartenas al diversaj grupiĝoj kaj identiĝas kun ties diversaj kulturoj (religioj ktp.), neniel pruvas, ke ne ekzistas esperantista identeco kun siaj specifajoj. Ĉiu homo povas aparteni al diversaj kulturoj samtempe, kiel mi jam montris.

AS asertas ke „[...] oni ĝenerale supozas, ke ĉiu homa lingvo reflektas difinitan kulturon”). Kiu estas „oni” Kiu ĝenerale supozas tion? Kiun „difintan”

kulturon reflektas la germana, la angla, la franca ktp.? La lingvoj ĉiam reflektas grandegajn partojn de aliaj kulturoj, de la monda kulturo. Kiun „difinitan kulturon” reflektas la franca lingvo de francparolanto el Malio, iun etnan lingvon aŭ la francan?

La germana kapablas reflekti diversajn kulturojn, se ili estas bone esprimitaj tradukitaj/ priskribitaj en la germana. Bone germane parolanta turko ja povas reflekti en la germana pri turkaj tradicioj. Kompreneble necesas klarigi nekonatajn nociojn, enkonduki novajn esprimojn aŭ transpreni ilin rekte el la fonto-lingvo (t.n. realaĵoj, pri japanaj realaĵoj en Esperanto kp. ekz. „Japana Enciklopedieto”). Kvankam la lingvo-kategorioj de la difinita lingvo ja influas la pensadon, tamen ili ne strikte kaj sklave determinas ĝin.

Laŭ mi la profunda eraro en tiu pensmaniero estas, ke ĝi ligas la kulturon al la lingvo kaj ne al la lingvo-komunumo. Tio montriĝas en jena demando de AS: „[...] Ĉu entute neŭtrala dua lingvo, kiu supertavoligas plurajn naciajn lingvojn kaj kulturojn, povas evolui ĝi propran kulturon?” Kompreneble la lingvo mem ne povas evoluigi tian kulturon, sed ja la lingvo-komunumo kapablas fari tion.

En ĉiu lingvo oni fariĝas informito, se oni legas pri aŭ partoprenas/is la eventojn. Kompreneble, la diversaj idealoj, la klopodoj de la movado (espero pri certagrada oficiala akceptiĝo de Esperanto, almenaŭ disvastigo k.s.), simboloj, sintenoj ktp., kiel substrekas AS „[...] ne povas esti rigardataj komunaĵo de ĉiuj esperantistoj”). Kompreneble ↩

La ludoj, kiujn ludas la „esperantistoj“

Malunuiĝo estas malforto

La celo estas kvereli kaj ĉiam trovi kontraŭargumentojn ene de iu grupo.

Poste kiam disiĝis la grupo oni rekomencas en la du subgrupoj.

Memkonvinkada ludo

Esperantistoj povas agrable pasigi la tempon dum pluraj horoj konvinkante unu la alian pri la boneco de Esperanto.



ne. „La“ movado ne ekzistas kiel klare konceptebla fenomeno. En la movado ekzistas tre diversaj grupiĝoj, tendencoj kun diversaj ideoj, idealoj, celoj, agoj ktp. Tial estus pli bone paroli pri lingvo-komunumo. Mi povus citi multajn sintenojn, ideojn, idealojn, sciojn, celojn ktp., kiuj ne estas komunaĵo de ĉiuj germanoj, eĉ ne tiuj de mia najbaro kaj mi.

Male al AS, laŭ mi en Esperanto (= la komunumo) troviĝas certaj kutimoj, antaŭjuĝoj, stereotipoj, sociaj reguloj, tradicioj, sintenoj (ekz. pri senperfortaj internaciaj rilatoj, lingva samrajteco).

Parolante pri tio, ĉu Esperanto havas/ne havas kulturon, oni klare distingu inter lingvo kaj la parolkomunumo. Tio helpas eviti konfuzojn.

Detlev Blanke

Tre ŝatata varianto: fari tion nacilingve anstataŭ lerni la lingvon.

Ataki la malamikojn

Dum tiu ludo oni kritikas laŭplaĉe la anglan lingvon, Volapukon aŭ Idon.

Kolektado de Flagetoj

Oni kreu retpaĝon pri iu ajn temo. Poste oni traduku ĝin al plej multe da lingvoj (eĉ malnovangla kaj simile) kaj oni nepre aldonu la flagetojn de ĉiuj eblaj landoj.

Reformo-ludo

Bona temo por tiu ludo estas la ĉapelitaj literoj, la akuzativo aŭ la sufikso „-in“.

Eĉ la antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto ŝategis tiun ludon kaj subtenis alternativan alfabeton.

Mensogi dum varbado kaj elpensi kaj uzadi la plej malbonajn varbofrazojn

La celo de la ludo estas plej serioze kiel eble eldiri frazojn kiel „eblas lerni Esperanton dum du semajnoj“ aŭ „estas 30 milionoj da esperantoparolantoj“. En la dua parto temas pri elpensi plej malallogajn sloganojn. Ekzemple „Esperanto la dua lingvo por ĉiuj“, „Esperanto universala lingvo“. Tiu kiu forkurigas plej multe da interesiĝantoj gajnas.

Ludi la gravulojn

Por tiu ludo bezonatas multe da papero kaj tempo.

Oni devas organizi multajn kunsidojn dum kiuj oni provu similaj al organizoj kiel la Eŭropa Unio. Estu multe da burokratismo, pseŭdodemokrateco. Diversaj voĉdonadoj, protokoloj.

Oni voĉdonadu por elekti iun, kiu finfine faros nenion.

Dum kongresoj oni povas elekti interesajn temajn programojn kaj ludi „Esperantistoj savos la mondon”.

Naciisma aŭ verdŝovinisma ludo

Temas pri ŝajni ke Esperanto estas lingvo de iu etno aŭ popolo.

Oni ŝvingas flagojn, kantas la himnon, uzadas vortojn kiel „Esperantujo/io”, „diasporo” ktp..

Plej lertaj en tiu ludo estas la membroj de la Esperanto-Civito. Ili jam havas senatorojn, konstitucian ĉarton, konsulojn kaj retejon „esperantio.net”.

La junularo partoprenu en tiu ludo per nepra kaj senfina prezentado de la tradicia folkloro danco la „bambo”. Subludo estas krei pli dikajn vortarojn ol tiu de la naciaj lingvoj.

Eminentaj ludantoj klopodis havi propran monunuon („stelo”) kaj propran teritorion.

Sektumado

Oni bezonas skulptaĵon de la Majstro, fotojn aŭ almenaŭ multajn stelojn.

Eblas ludi en la kluboj, aŭ sur la strato dum inaŭguroj de monumentoj.

Sed eblas ankaŭ amuziĝi hejme me-tante ikonojn de Zamenhof sur la mu-

ron.

Plej bone eblas ludi en kasteloj ĉefe en Franclando, kie la sektoj ofte posedas kastelon.

Oni ripetadu la mistikan esprimon „interna ideo” kaj „Majstro”, „propagando”, „fina venko”.

Kiel vi vidas ekzistas multaj ludoj inter kiuj eblas elekti kaj amuze pasigi la tempon anstataŭ okupiĝi pri grizaj enurigaj taskoj kiel terminologio, uzo en la vera praktika vivo (komerco, scienco, turismo).

Thierry SALOMON

<http://internacialingvo.ini.hu>

Bibliografio:

BERNE, Erich: *La ludoj, kiujn la homoj ludas* (nacilingve).

Aperis la novelaro *La planedo de la senfelaj simioj kaj aliaj rakontoj* (ISBN: 963 218 213 8 mendebla ĉe UEA kaj FEL). Du rakontoj el tiu libreto „La martelistoj” kaj „Reveno al Esperantolando” iel similas al „La ludoj, kiujn ludas la ‘esperantistoj’”.

Planedo de la senfelaj simioj, La. Kaj aliaj rakontoj. Thierry Salomon. Prozo originala, rakontoj. Abonasoft. Budapest. 2005 (2a eld). 28 paĝoj. Prezo: 2,40 EUR.

Klarigo: Mallongaj soci-fikciaj kaj -satiraj rakontoj.

Libroservoj povas mendi la novelaron ĉe: AbonaSoft, Bakats u. 1/3 III.1 HU-1093 Budapest tel/faksilo (+36 1) 2173912 <http://abonasoft.netfirms.com>

La malkvieta vivo de Lejzorĉjo Rojtsvanco



[...] Lejzorĉjo kapablis majstre tajli pantalonojn. Malgraŭ tio, kion babilis Pfeifer kaj aliaj, malfavoraj al li, mi konstatas: antaŭ li kaŝiĝu Cimaĥi kun sia kvazaŭ angla fasono! Sed en Tulo vivas multe da kudristoj; la civitanoj turniĝis kun melankolio, irante preter la brilaj ŝildoj. Nur en virinaj babiladoj Tulo produktas samovarojn kaj mielkukojn, efektive Tulo okupiĝas pri reduktado. Kun helpo de sia tondilo Lejzorĉjo ne povus ekzisti eĉ unu tagon ĉi tie. Savis lin tiu fama dialektiko: se oni reduktas,

tio signifas, ke oni akceptas.

Tia estas la naturreĝo: unu homon oni forpelas el ĉambro, kaj sur lia loko oni sidigas alian, kaj la forpeliĝo, simple, ankaŭ devas manĝi kaj se iu estas forpelita el unu ĉambro, tiu povas eniri alian ĉambron, ĉar la tero, spite al la Talmudo, turniĝas, kaj kun ĝi turniĝas ĉiuj viglaj homoj, laborantaj en ĉiuj eb-laj fakoj.



Kara redaktoro!

De jaroj mi partoprenas diversajn Esperanto-aranĝojn en via lando. Mi havas fidelajn geamikojn inter la verdsteluloj, kiuj parolas flue, kaj diligente uzas la internacian lingvon. Kun ĉiam pli granda miro mi foliumas Jarlibrojn de UEA, ĉar mi trovas de multaj jaroj, ke la nombro da membroj de Pola Esperanto-Asocio kvankam ne kreskas, tamen ĉiam sumiĝas al 820 personoj, do sufiĉe granda nombro!

Laŭ tiu informo povus ŝajni, ke la pola movado estas en plena disfloro. Mi tamen vidas la malon. Krom kelkaj lokaj esceptoj tiu movado apenaŭ vivas. Ĉu ne okazas tiel, ke la respondeculoj praktikas la virtualan statistikon, imitante la ekzemplodonan agadon de Lejzorĉjo Rojtsvanco el la mondkonata romano de Ilja Erenburg, kiu – se necese kaj kontraŭreale – multigis kuniklojn en la Tula gubernio, por kontentigi la centran oficejon en Moskvo. Ĉu ne same estas nun? Kun tiu nombro da membroj PEA devus esti inter la plej aktivaj Esperantio-asocioj en la mondo. Strange, mirinde...

Donace – eble por haltigi iom frenezan statistikon kaj kaŭzi, ke tamen la vero triumfu – ĉar iu ajn vero – eĉ se doloriga – pli bonas ol mensogo kaj trompado – mi sendas al vi ĉapitron el la verko de Erenburg, kiun mi tradukis kun dediĉo al ĉiuj, kiuj respondecas pri tiu fatala Rojtsvancaĵo aŭ Gogoleska registrado de malvivaj animoj en Pollando. Kun amikaj salutoj, respektoplene por ĉiuj estimindaj kaj veremaj polaj gesamideanoj

Saŝa el Rusujo

Ne pasis semajno, kaj Lejzorĉjo trovis ĝustan pardonon. Li eklaboris en la gubernia fako pri brutobredado kaj lia devo estis inspekto pri generado de rasaj kunikloj en la tuta gubernio, ĉar en la centra oficejo oni decidis, ke estas unu el la plej profitodonaj sferoj de la estonta agrokulturo.

Enirinte tra la pordo malfermiĝanta antaŭ li, Lejzorĉjo ĉirkaŭrigardis energie en la kampo de sia estonta agado, kie staris unu skribotablo kun malpura sorbopapero kaj li turniĝis al pedelino Dunjo:

– Mi petas vian pardonon, kamaradi-
no, kie estas la plej grava objekto?

Dunjo oscedis:

– Nu, kie? Hejme, li trinkas teon. Aŭ li sidas ĉe Maria Ignatjevna.

– Ŝŝŝ! Mi ne demandas pri la kamarado oficejestro. Mi tute ne volas demandi pri li. Sufiĉos al mi, ke en Kievo mi kaptis estimatajn piedojn. Ne, mi demandas pri tute senpekaj kunikloj.

– Ili ne estas ĉi tie, kaj se vi deziras vidi Kropotkovon, li ankaŭ ne estas ĉi tie, sed en la librotena fako.

Lejzorĉjo rigardis en la tirkeston, sed li trovis nur malplenan cigaredskatolon. Honeste li sidis ĝis la kvina, poste li iris hejmen. Li decidis solene ne filozofiadi. Tamen en la sekva mateno li kuraĝis turni sin al la oficejestro:

– Mi petas vian pardonon, kamarado Petrov, mi volas nur demandi, kie ili estas, tiuj kunikloj havigitaj al mi, ĉi tie aŭ sur kampo?

Petrov murmuris:

– Diabloj scias! Ŝajnas, ke en tiu ŝranko. Serĉu en dokumentoj.

Lejzorĉjo laboris dum la tuta ta-

go. Kun necesa singardo, kiel rasa ter-
hundo, li trafosis la tirkestojn, ternante pro terura polvo. Fine li trovis, se ne tiujn kuniklojn, do kopion de la skribaĵo n-ro 2178, en kiu estis raporto pri la malgaja sorto de iu rasa paro, kiu venis el la centra oficejo al la benata Tulo. La antaŭulo de Lejzorĉjo, iu Roĵkov, nun laboranta en la muzika fako, sciigis Moskvon: „Konfirmante akcepton de la rasa ŝarĝo, ni komunikas, ke la senditaj bestoj ne venis al la Tula bredopunkto pro lokaj kvalitoj de klimato, provizaj malfacilaĵoj kaj manko de kono ĉe loĝantoj pri kuniklobredado, ĉar post la kontrolo en la pakaĵo oni trovis jam mortintajn bestojn kaj laŭ atesto el la veterinara punkto ĉi tie la morto okazis pro frostoj, aŭ pro manko de azoto en la nutraĵo, aŭ pro konduto de civitanoj en la stacidomo, kiuj malferminte la pakaĵon memvole, aranĝis tumultan ĉasadon kun partopreno de senhejmaj hundoj el la urbo Tulo”. Tri fojojn relegis Lejzorĉjo tiun malgajan skribaĵon kaj uzante la okazon, ke la pedelino malaperis ie, li suspiris terure:

– Ho, kompatinda rasa paro, jen kio restis el viaj petolaj saltoj tie sub amerikaj palmoj: la kopio de la skribaĵo numero du mil cent sepdek ok! Sed mi demandas, kion mi faru? Kiamaniere mi generu en la tuta vasta gubernio la kruelan rememoron?

Ne povante elteni turmentan malplenon de la skribotablo kaj de la Tula gubernio, Lejzorĉjo denove alparolis kamaradon Petrovon du tagojn poste:

– Kion mi faru nun, kiam ili nerevokeble mortis kaj ilia sorto estas eĉ sigelita per tiu kopio?

– Nu, kion fari? Labori, kamarado, labori! Generi! Produkti! Esti aktiva! Ĉu vi komprenis? Vi vidas la komparan tabelon? Viando – unu. Felo – du. Nepostulemo – tri. Tempoŝparo – kvar. Ĝis la fino de la raporta periodo ni havos ne malpli ol tridek mil pecojn.

– Mi petas vian pardonon, kamarado Petrov, sed el kio kreskos tiu eksterordinara felo aŭ eĉ viando, se la mildajn pragepatrojn disŝiris tumultaj hundoj? Mi povus nur generi bredan malĝojon, sed tio ne donos al ni plaĉan tabelon, ĉar ili, kun pardonpeto, mortis kvazaŭ spite al ni.

– Ili mortis? Ha-ha! Vere ili mortis. Sed – parolante inter ni – kiuj kunikloj povas vivi ĉi tie? Mi ankoraŭ komprenas, ke porkoj. Tamen vi, kamarado, generu. Moskvo sendos novajn kuniklojn, dume oni povus skribi almenaŭ instrukcion por kolfiŝoj. Aŭ faru prelegon kun lumbildoj. Mallonge dirite, ne enprofundiĝu. Ĉu vi komprenis? Ni ĵus ricevis enketilon el la centra oficejo. Ĉi tie estas deksep demandoj pri via fako.

Lejzorĉjo restis kun deksep demandoj kaj granda hezito. Kion signifas – „ne enprofundiĝu”? Pritrakti la kuniklojn kiel kuniklojn? Ni supozu. Sed en la paragrafo deknua ili demandas lin: „Ĉu enkonduko de bredado de la rasaj kunikloj havas influon sur la ekonomian situacion de kamparanoj? Sur la kulturan vivon? Sur iliajn familiajn rilatojn? Ĉu lige kun tio oni rimarkas kreskon de la naskonombro? Oni devas per rondaj ciferoj montri rilaton inter la kvanto da kunikloj kaj la mendo pri sapo en ĉiu bieneto”. Se la kunikloj estas kunikloj – do ili tute ne estas. Oni povus ja

supozi, ke la kunikloj signifas nur gravan simbolon de iu grandioza elektrigado. La Talmudo enhavas multe da tiaj frenezaj petoloj. Ekzemple oni skribas „cicoj de ŝafinoj”, sed devus esti sanktaj ujoj de levidoj. Verŝajne sub la vorto „kunikloj” tiuj komprenas la plej ordinaran partian ĉelon?... Tamen kamarado Petrov diris: „Ne enprofundiĝu”.

Post longa hezito Lejzorĉjo detenis sin de alegorioj. Al la unua demando: „Kiom da kunikloj troviĝas en la Tula gubernio, en la tago, kiam oni plenigis la enketilon”, li respondis decide: „Unu tomoŝtono en formo de la kopio, kiu estas korŝira por mi”, kaj apud la ceteraj deksex demandoj li faris tragikan strekon: nek sapo, nek naskoj, nek familiaj rilatoj – malpleno, malespero, malekzisto.

Por ĉia okazo Lejzorĉjo montris la folion al la oficejestro. Tiam kamarado Petrov kuregis en la longa koridoro kaj muĝis:

– Ĉu vi frenezigiĝis? Ĉu vi scias, kio estas redukto?

– Mi supozas! Mi havas impreson, ke mi, kaj ne civitanino Pukje, pasigis ses semajnojn en la malliberejo.

– Vi scias nenion! Vi volas nin ĉiujn pereigi! Kiel oni povas respondi tiel al la enketilo? Oni devas esplori la problemon. Oni devas laŭdi sin per atingiĝoj. Tabeloj, listoj, diagramoj. Se vi sendus tiun stultaĵon, ni ĉiuj irus antaŭ la tribunalon. Tuj ŝanĝu ĉion denove. Vi havas eĉ ne iomete da sento pri la ŝtata vivo. „Tomoŝtono!” Kio ĝi estas – ĉu spritaĵo?

Por Lejzorĉjo venis tagoj de laboro. Je la tria el la oficejo eliris kamarado

do Petrov, je la kvina – pedelino Dunjo. Tamen Lejzorĉjo ne sciis, kioma horo estas: li sidis ĝibiĝinta ĉe la skribotablo, li kalkulis, pensis, planis.

Fine de la kvina labortago li estis preta. Li respondis al ĉiuj deksep demandoj. Li skribis:

„Ĉar la morta paro estis sendita al Tulo la 18an de novembro 1924, oni povas nun kalkuli la nombron da kunikloj en la Tula gubernio je 11 726 kaj duono. Pro ĝusta agado kaj manko de roza akvo oni antaŭvidas por la 1a de januaro 1930 en la nomita gubernio 260 784 kuniklojn. La nociojn kiel zizelo aŭ filoksero oni ne vidis.

Koncerne aliajn malsanojn – krom tiu malfeliĉo, kiu trafis la unuan paron, kaj probabla, sed tute ne signifa kataro – ne estas plendinde dank’ al la braveco de la gubernia oficejo pri sano. La kunikloj estas bredataj en la plantejoj sub palmoj kaj en aliaj ŝrankoj. La nombro da naskoj ĉe la loĝantoj lige kun la supre dirita nekredible kreskas, kaj en saporproduktado neniu povas egaligi kun ni, ĉar se por unu bieneto estas iu mizera, duone forlavita peceto, do laŭ rondaj ciferoj oni povas diri, ke tio estas ronda nulo rilate al la riĉega plumaro de tiu aŭ alia milo da kunikloj”.

Skribinte ĉion Lejzorĉjo decidis ne plu kolerigi kamaradon Petrovon, jam okupitan pri Maria Ignatjevna kaj li resendis la folion al Moskvo. Preskaŭ du semajnojn li ĝuadis silenton kaj kvieton. Pedelino Dunjo oscedadis, solece malvarmiĝis lia teo, kamarado Petrov malaperadis kun fruktodonaj intencoj, kaj la inspektoro pri bredado de kunikloj havis nenion por fari, ŝajne ke li

desegnadis sur la sorbopapero la orelojn de la neforgeseblaj pragepatroj. Kaj subite en la koridoro aŭdiĝis laŭta paŝado: el Moskvo venis la komisiono por esplori unikan bredadon de la kunikloj en la Tula gubernio.

– Antaŭ ĉio ni devas gratuli al vi, kamarado – en via gubernio estas pli multe da kunikloj en la tuta Sovetio. Ŝajne vi trovis escepte konvenan nutraĵon. En Anglio oni ĝisatendis tiajn rezultojn kun helpo de fosforaj preparaĵoj. Sed ni tiros al ili la nazon malsupren. Per kio vi nutras viajn kuniklojn?

Lejzorĉjo modeste mallevis la okulojn.

– Nur per mia ofica fantazio.

La moskvanoj ne komprenis. Ili diris milde:

– Ni jam vidos tion surloke. Morgaŭ ni veturos al la kolĥozoj. Diru, en kiu distrikto plej amase naskiĝas la kunikloj?

– Kie ili naskiĝas? Nek en la distrikto, nek en la ŝranko, sed ĉi tie.

Lejzorĉjo fiere montris sian kape-ton.

Tiam en la koridoro denove aŭdiĝis krakado de botoj, sed ĉi-foje malbonaŭgura. Kamarado Petrov forgesis pri Maria Ignatjevna.

– Vi trompis nin ĉiujn? En malliberejon? Antaŭ tribunalon!

– Kial vi kriegas min, kamarado Petrov? Kiam mi skribis, ke estus malfacile esperi pri admirinda multiĝo de la mortintoj, vi batis la plankon per viaj piedoj. Tiam mi komencis turmenti mian malfortikan bruston per multiplika tabelo kaj faris ofican miraklon: mi devigis tiujn mortintojn al generado. Kaj vi

denove batas la plankon per viaj piedoj, kaj mi komprenas nenion plu. Vi rememorigas al mi, mi petas vian pardonon pro tiu malĝusta komparo, roman imperiestron, ĉar iam vivis la freneza idolo Adrian kaj kiam unu judo vidante lin ne riverencis, li kriis: „Rapide dehaku al li la kapon! Kiel li, tiu senhonta judo, povis ne riverenci antaŭ la roma imperiestro!”

Sed poste li ekvidis alian judon, kiu tuj – kompreneble – riverencis kaj tiam li kriegis denove: „Ankoraŭ pli rapide dehaku la kapon ankaŭ al tiu judo. Kiel li povis kaj kiel senhonte, ke tia ulo riverencu antaŭ mi!” Do, mi demandas vin, kamarado Petrov, kion faru iu ajn bredanto de kunikloj, se estas malpermesite al li diri la veron kaj eĉ ne mensogi ridinde?

– Vi ŝajnigas ruzulon-stultulon, sed ni vidos, kion vi diros, kiam vi sidos en la malliberejo.

– Nenion, mi jam alkutimiĝis kaj plej ofte mi silentas tie aŭ rakontas malĉastajn spritaĵojn. Mi ne ŝatas nur ke mi estas kaptata. Tiam mi havas korbatadon pro teruro. Pli bone mi iros nun sola al la mallibereja pordego kaj petos, ke oni enlasu min tien, mi diru, unu horon pli frue. Tio estos multe pli agrabla. Adiaŭ, kamarado Petrov! Adiaŭ! silento de la skribotabloj en la fako pri brutobredado, adiaŭ! teo de pedelino Dunjo kaj tre malgajaj fantomoj de la mortintaj pragepatroj, kiuj tage kaj nokte saltis en mia fuŝa kapo de la plene lojala fakulo. ❄

Forpasis granda Homo

Merkrede, la 18an de januaro 2006, mortis en la aĝo de 91 jaroj, el tio 58 jaroj en la sacerdoteco, pastro Jan Jakub Twardowski. La funebraj ceremonioj okazis ĵaude kaj vendrede – la 2an kaj 3an de februaro 2006 en Varsovio. La sanktan meson kuncelebris Primaso de Pollando kardinalo Józef Glemp en Baziliko de Sankta Kruco en Varsovio.

La Prezidento de Pola Respubliko Lech Kaczyński pri pastro Johano J. Twardowski diris jenon: Kun doloro atingis min la sciigo pri la morto de Pastro Jan Twardowski. Li difinadis sin mem „la pastro skribanta versaĵojn”. Li estis la poeto, kies poeziaĵojn kun kortuŝo kaj rideto legadis generacioj de polinoj kaj poloj. La homo modesta, grandkora, plena de la vivsaĝeco. En la koroj de ni ĉiuj postrestos bonaj konsiloj, la estimo por modestuloj kaj tiu neforgesebla fascino pri la mondo. Antaŭ ol eniri la porpastran seminarion, Li batalis en Armia Krajowa (Landa Armeo – AK). Li partoprenis en Varsovia Ribelo en la 1944a jaro. Liaj vortoj plenigadis dum lastaj jaroj ĉiudimane la preĝejon de Monahinoj Wizytki en Varsovio. Malgraŭ malfacilaj spertoj Li estis plena de spiritekvilibro, kiu emanis al ĉiu homo. Li helpadis al ni ekkompreni la sencon de la vivo – nun Li helpas al ni ekkompreni la sencon de la morto. Kiel Li skribis en la versaĵo - „Por ke vekigi” – „...kaj eble pro tio ni mortas, por ke ni estu videblaj kaj malvideblaj”. Maldeviga estas tristo, kvankam aflikto venas mem – kiel malinvitita gasto.

Stanisław Śmigielski

Pintumi PinterECE

La Nobel-premion pri literaturo en 2005 ricevis la 75-jara brita dramverkisto Harold Pinter. La membroj de la Sveda Akademio voĉdonis por li, distingante la aŭtoron, „kiu per siaj teatraĵoj malkovras abismon sub la ĉiutaga babilado kaj elrompas pordojn al malkuraĝigaj fermitaj ĉambroj”.

Tiu distingo estis surpriza, ĉar post Pinter staras longa vico da aŭtoroj, kiuj de jaroj vane atendas ĉi honorigon, kaj inter tiuj la plej granda malvenkinto kiel ĉiujare proponata Mario Vargas Llosa el Peruo.

Pinter estas konata kiel reprezentanto de la teatro de absurdo (kun tiaj verkistoj kiel Beckett aŭ Ionesco). Li kreis tn. komedion de minaco (comedy of menace), kiu „malkaŝas ŝajnan komunikadon inter homoj kaj dramatan senhelpecon de ĉiu homo kontraŭ la mondo, kaj propra subkonscio”.

Inter la plej gravaj teatraĵoj de Pinter estas *The Birthday Party* (1957), *The Caretaker* (1959), *The Homecoming* (1964) kaj *No Mans's Land* (1974).

La maniero, en kiu Pinter utiligas la dramecajn valorojn de silento, maldensaj dialogoj kaj unika humursento (li rimarkis iam: „Ekzistas neniu klara distingo inter la reala kaj la malreala”), kaŭzis, ke en la anglalingva medio oni

diras, ke iu situacio estas Pintereska. Ne hazarde lian plej ŝatan informon pri surscenigo formas la vorto „paŭzo” aŭ tripunktoj (cetere li mem reĝisoras en teatroj).

En 1958 li skribis „Ĉio, kion oni devas fari pri teatraĵo, troviĝas en teatraĵo”. Pri siaj figuroj braktantaj kutime en malvasta ĉambro li diris: „Ĝuste en silento ili fariĝas por mi pli evidentaj”.

Harold Pinter naskiĝis la 10an de oktobro 1930 en la londona East End kiel filo de juda tajloro. Dum la 2-a mondmilito li estis trifoje evakuita el sia urbo. „La sento esti sub falantaj bomboj neniam forlasis min” – li skribos poste.

Dum lernado en Hackney Downs Grammer School, li estis leganta ĉefe el Kafka kaj Hemingway kaj aktoris en diversaj prezentadoj. Du jarojn poste li forlasis studojn en Royal Academy of Dramatic Art (RADA), por aliĝi al migranta teatrotrupo. Kiel David Baron li aktoris en Irlando kaj Anglio.

En 1949 li rifuzis soldatservon, kio minacis al li per malliberigo. Al la kunsidoj de la tribunalo li venadis kun dentbroseto. Finiĝis per monpuno de 30 pundoj. „Certe oni soldatigos min, kiam eksplodos nova milito” – li ripeta-

dis. – Sed ankaŭ tiam mi rifuzos ĉion”.

En 1950 li aperigis poemaron sub la nomo Harold Pinter. Tiutempe li estis ankoraŭ laboranta kiel aktoro en BBC Radio kaj studanta mallonge en Central; School of Speech and Drama. En 1957 li debutis per la unuaktaĵo *The Room*, skribita por la universitata teatro en Bristol. *The Birthday Party* (1957) estis prezentata en Bristol kaj poste en la londona West End, sed post semajno ĝi elfalis el la programo. Ĉiuj recenzoj estis senkompataj. Tial poste Harold Pinter rimarkos: „Ni ne bezonas kritikistojn, ke ili parolu al la publiko, kion ĝi pensu”.

Tamen la publiko iom post iom alkutimiĝis al lia stilo. *The Homecoming* (1964) estas teatraĵo pri filo, kiu venigis sian edzinon al la hejmo de la gepatroj kaj konvinkiĝis, ke nek li estas bezonata ĉi tie al iu, nek iu bezonas lin. Nur ĉi tiu verko diskonigis lin tra la mondo.

Pinteron ne kontentigis nur la teatro. Li skribis ankaŭ scenarojn por la filmoj de Joseph Losey – *The Servant* (1963) kaj *The Accident* (1967). Cetero en tiuj filmoj li rolis ankaŭ kiel aktoro. Li skribis scenarojn laŭ la romano de Fowles por la filmo de Reisz *The French Lieutenant's Women* (1981) kaj laŭ la romano de Kafka *La proceso* por la samtitola filmo de Jones (1992). En 1977 oni eldonis neniam realigitan, sed majstre verkitan scenaron de Pinter por la romano de Marcel Proust *En serĉado de la perdita tempo*.

En la jaroj 1956-1980 Pinter estis edzo de aktorino Vivien Merchant. Ŝi prezentigis en liaj teatraĵoj, kvankam

li ripetadis obstine, ke neniam li skribis rolon por konkreta persono. Post la divorco en 1980, li edziĝis kun verkistino Lady Antonia Fraser, kiu skribis biografiojn de Cromwell kaj de la edzinoj de Henriko la 8-a.

Lastatempe Pinter estis konata pro siaj politikaj kritikoj. Pri politiko li okupiĝis protestante kontraŭ faligo de la registaro de Salvador Allende en Ĉilio (1973). Li kritikis regadon de Margaret Thatcher kaj Ronald Reagan. Li estis kontraŭ interveno de NATO en Kosovo (1993), kontraŭ persekutado de kurdoj en Turkujo, kontraŭ invado de usonaj trupoj en Afganlando kaj kontraŭ la milito en Irako. En 2003 li skribis ironian poemon *God Bless America*. En februaro 2005 Pinter avertis, ke li forlasos la karieron de dramverkisto kaj okupiĝos nur pri politika agado. „Mi skribis 29 teatraĵojn. Ĉu jam ne estus sufiĉe?” Tamen li pretigis radiodramon *Voices*, per kiu BBC honorigis lian 75-jariĝon.

Harold Pinter ne estas ŝatata en amaskomunikiloj. Li teniĝas malproksime de establishment, li rifuzis akcepti la nobelecon, kiun proponis al li ĉefministro John Major. Lia pasio estas kriketo.

En 2000 li ricevis kemioterapion pro la kancero de la ezofago, kiu tute mutigis lin.

La distingon por Harold Pinter kun ĝojo akceptis aŭstrino Elfriede Jelinek, ricevinta la Nobel-premion antaŭ du jaroj: „Denove la verkisto maldekstrema kaj eminenta, tuj mi festos tiun ĉi eventon solene”.

kompilis Multlegulo

La kukuludo

Ĉu vi rimarkis kiom da Zamenhoffestoj okazas fine de jaro? Ne paniku! Trinku teon. Sekvontfoje venu al iu(j).

Mi iris al tiu ĉarma kaj impresiga en Kaliningrado por diskuti kaj distriĝi kun Esperantisto de la Jaro: Povilas Jegorovas kaj kun Irmina Szustak, Irek Bobrzak, Aleksander Korĵenkov, Halina Gorecka kaj kun aliaj naŭdek geesperantistoj. Povilas sian primovadan starpunkton prezentis en la januara *La Ondo de Esperanto*. Ceteraj faras tion kutime dum teogustumadoj.

Fakte, la pejzaĝo de nia movado kaj post la diskutoj, kaj post ekz. tralego de la intervjuo kun Tomasz Chmielik (PE n-ro 6/2005), kaj post kelkaj primovadaj prelegoj dum la XXI Arkones, aspektas por mi iom dolĉ-amare. Bone, ĉu povas dolĉamari pejzaĝo eĉ esperantomovada? Ne. Do ni nur dolĉumu: en Litovio ekde jaro 2000 aperis pli ol 70 E-libroj kaj kiom da en Pollando? Ĉu iu povus respondi? Ŝajne ne malpli. Estus interese legi liston de polaj E- novaĵoj en *Pola Esperantisto*. Des pli ke neniu (PEA, PE, aliaj) popularigas kaj fakte distribuas ilin. Kompreneble mi parolas ne pri similaj al la belega turisma E-informilo „Tatra Nacia Parko” eldonita okaze de la IJK en Zakopane fare de Eldonejo de TNP, sed pri aliaj, kies ekzistoj oni eĉ ne supozas.

Mi mencias nur kvar laste presitajn, sciencnivelaĵajn, pollingvajn librojn, kiuj temas pri Esperanto aŭ pri internacia lingva komunikado:

– *Spółczesność obywatelskie w procesie integracji europejskiej* (La civitana socio dum la eŭropa integriĝo) eldonita de la Agrikultura Altlernejo (Akademia Rolnicza im. Augusta Cieszkowskiego) en

Poznań en la jaro 2002. En ĝi vi trovos eseojn de Zbigniew Galor, Zlatko Tišljar, Michael Ćwik („Lingvo kaj civitaneco en Eŭropo”) kaj de aliaj.

– *Inna (?) Europa* (Alia (?) Eŭropo) ankaŭ eldonita de la Agrikultura Altlernejo en Poznań en la jaro 2004. En ĝi vi trovos eseojn de Detlev Blanke, Zbigniew Galor kaj aliaj. La ĉapitron verkitan de Ilona Koutny „La interkultura komunikado en Eŭropo: angla kaj esperanto lingvoj kiel alternativaj komunikiloj”, krom interesitoj nepre devus studi estraranoj de PEA, PEJ kaj aliaj aktivuloj, ĉefe tiuj kiuj rilatas kun amaskomunikiloj.

– *Etniczność. Ład – konflikt – sprawiedliwość* (Etneco. Ordo – konflikto – justeco) eldonita de Wydawnictwo Poznańskie en 2004 jaro. Walter Ŝelazny – la aŭtoro, sur 260 paĝoj plurfoje mencias Esperanton – la lingvan, kulturalan kaj socian fenomenon. Pri tiu profunda kaj interesa libro indas aparte artikoli.

– *Czy święci mówią w esperanto?* (Ĉu sanktuloj parolas Esperante?). En la libro eldonita en Malbork en la jaro 2005 la aŭtorino Katarzyna Tempczyk kontinuas esplorojn de Jerzy Korytkowski pri rilatoj inter eklezio kaj Esperanto. Sur 124 paĝoj vi trovos bonan historian, dokumentigan kaj ekumenan materialojn.

Do jen vi vidas ke ne estas tiom amare kiom vi sentis. Sukeras ankaŭ informo ke Artaj Konfrontoj en Esperanto Arkones okazos en Poznań jam la 22an fojon (29.09. – 1.10.2006).

Nepre vizitu retpaĝon:

www.arkones.republika.pl. Ĉe la adreso www.arkones.esenco.org/galerio vi povos rigardi fotojn de okazintaj Arkonesoj. Tie vi rimarkos ke Zbyszek Galor kaj Kasia Tempczyk ankaŭ bele dancas.

Paweł Janowczyk

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ĈIRKAŬ

La prepozicio **ĉirkaŭ** estas sufiĉe ofte uzata de esperantistoj kaj pro tio indas konatiĝi kun ĝia korekta uzado. Tiu ĉi prepozicio estas montranta, ke io (iu) troviĝas:

1. En la spaco kuŝanta ĉiuflanke de io (iu): (tute ne devas esti rondforma pozicio malgraŭ la simileco kun la vorto cirklo) **ekz.:** Densa nebulo volviĝis aŭtune **ĉirkaŭ** Jamno-lago. **Ĉirkaŭ** lia domo troviĝas verda kreskaĵbarilo. La Tero rivoluas (=rondiras) **ĉirkaŭ** la Suno kaj samtempe ĝi rotacias (=turniĝas) **ĉirkaŭ** sia akso. Jam multaj artefaritaj satelitoj estas rivoluantaj **ĉirkaŭ** la Tero. Internacia Klubo „Esperantotur” organizas ĉiujare ekskursojn **ĉirkaŭ** la mondo.

Li ĵetis ambaŭ brakojn **ĉirkaŭ** la kolan de sia amatino kaj poste ŝi per siaj anĝelaj brakoj pendis **ĉirkaŭ** lia kolo. La genepoj formis etan rondon **ĉirkaŭ** la avino. Multaj loĝantoj de Koszalin ŝatas rajdi sur bicikloj **ĉirkaŭ** sia urbo .

2. En la spaco proksima al io (iu) ekz.: Abundaj bukloj de blondharulino ondiĝadis **ĉirkaŭ** ŝiaj ŝultroj. La viroj ariĝis **ĉirkaŭ** ŝi kiel muŝoj **ĉirkaŭ** sukero. ĈEP-partoprenintoj gaje kantis sidante **ĉirkaŭ** la fajro. Urszula Giercarz scipovas kolekti multajn kantemulojn **ĉirkaŭ** si. Pesilo balanciĝas **ĉirkaŭ** la ekvilibra pozicio. Dum ventego la boato swingiĝis **ĉirkaŭ** sia ligoŝnuro. Granda ŝtono es-

tis pendigita **ĉirkaŭ** lia kolo. Miloj da kuloj svarmis **ĉirkaŭ** nia tendo.

3. Proksimume en la tempo: (= iom pli aŭ malpli) **ekz.** La ventego trankviliĝis **ĉirkaŭ** la mateno. Ŝi telefonis al li **ĉirkaŭ** la tagmezo. **Ĉirkaŭ** la tria horo posttagmeze li vizitis ŝin. **Ĉirkaŭ** la vespero venis al ŝi dio de dormo. Ili interkonsentis renkontiĝi denove **ĉirkaŭ** Pasko (= en iu tago antaŭ aŭ post Pasko). Neniu scias kio okazis **ĉirkaŭ** la tempo de ilia edziĝfestoj.

La granda persekutado furiozis plej kruele **ĉirkaŭ** la mezo de la 14a jarcento.

Rimarko 1. Proksimuman tempopunkton kaj mezuron oni povas esprimi ankaŭ per **de ĉirkaŭ:** **ekz.** Ŝi havas la aĝon **de ĉirkaŭ** sesdek jaroj kaj laboras ĉiutage **de ĉirkaŭ** la sepa. La dunganto ne kontaktiĝis kun ŝi **de ĉirkaŭ** kvar monatoj. La vastbranĉa platano en la parko havas la alton **de ĉirkaŭ** 30 metroj. Alumetoj estas vendataj en la kvanto **de ĉirkaŭ** 40 pecoj en ĉiu skatolo.

Rimarko 2. La prepozicio **ĉirkaŭ** (same kiel **ĝis, inter, po, super**) povas stari eĉ antaŭ numeralo de subjekto: **ekz.** Nia vojaĝo al Mielno daŭris **ĉirkaŭ** tri horojn (= ĝi daŭris horojn **ĉirkaŭ** tri). En Mielno-Unieście somerumas ĉiujare **ĉirkaŭ** 120 miloj da feriantoj. Ĉe la maro la spiradvojojn trafluas ĉiutage **ĉirkaŭ** 10-15 m³ da

saniga aero saturita de jodo. Por ellerni Esperanton oni bezonas **ĉirkaŭ** kvar monatojn. Ŝi pagis por sia nova cifera fotilo **ĉirkaŭ** sescent zlotojn. Dispanante pri **ĉirkaŭ** du mil zlotoj oni povas aĉeti sufiĉe bonan komputilon. **Ĉirkaŭ** kvin monatoj pasis de nia lasta renkontiĝo.

Rimarko 3. La prepozicio **ĉirkaŭ** povas kombiniĝi kun la prepozicio **ĝis**, **ekz.**: Li drinkis **ĝis ĉirkaŭ** noktomezo kaj ŝi dancis **ĝis ĉirkaŭ** la 5a horo matene.

Vortfarado kun la prepozicio ĉirkaŭ (la sistemo de vortfarado estas unu el la fundamentoj de la lingvo, do ĝi meritas nian specialan atenton):

ĉirkaŭa (= estanta ĉirkaŭ io) Polio havas bonajn rilatojn kun ĉirkaŭaj landoj.

ĉirkaŭe (= runde ĉirkaŭ io) **Ĉirkaŭe** de la domo troviĝis multe da neĝo.

ĉirkaŭen – Vizitante la urboplacon turistoj malgraŭvole rigardis **ĉirkaŭen**.

ĉirkaŭi (= rondumi) Marmoraj figuroj **ĉirkaŭis** la tutan konstruaĵon.

ĉirkaŭita Lia fratino estis **ĉirkaŭita** de ĵurnalistoj kaj fotistoj.

ĉirkaŭigi (= ion per io) Ŝi **ĉirkaŭigis** sian kolon per kolora rubando.

Ĉirkaŭ apartenas al prefiksigeblaj prepozicioj. Funkciante kiel prefiksoido ĝi havas diversajn signifojn. **Jen pluraj ekzemploj**:

ĉirkaŭrigardi (= rigardi de ĉiu flanko) **ekz.** aŭton, antaŭ ol ĝin aĉeti;

ĉirkaŭbari (= bari de ĉiuj flankoj per barilo) **ekz.** ĝardenon, aŭtoparkejon;

ĉirkaŭfermi (= ĉirkaŭigi per io, kio fermas) **ekz.** ĝardenon per heĝo;

ĉirkaŭbraki (= brakumi, ĉirkaŭ-

premi) **ekz.** la edzinon, amatinon, amikinson;

ĉirkaŭiri (= rondiri, moviĝi ĉirkaŭ iu aŭ io) **ekz.** ĉirkaŭiri la domon;

ĉirkaŭflugi (= flugi ĉirkaŭ) **ekz.** La cikonioj ĉirkaŭflugis la preĝejturon;

ĉirkaŭveturi (= veturi en la diversajn partojn de regiono, lando, mondo);

ĉirkaŭvolvi (= ĉirkaŭigi ion per io) **ekz.** la kolon per lana ŝalo;

ĉirkaŭkovri (= envolvi kovri per io) **ekz.** la korpon per nokta ĉemizo;

ĉirkaŭligi (= ĉirkaŭvolvi ion per ligilo) **ekz.** aktojn, dokumentojn;

ĉirkaŭplekti (= plekti ĉirkaŭ io) **ekz.** izolatan strion ĉirkaŭ kablo;

ĉirkaŭlavi (= lavi ion ĉirkaŭe) **ekz.** siajn manojn antaŭ manĝado;

ĉirkaŭvojo (= rondira vojo ĉirkaŭ io) **ekz.** fari ĉirkaŭvojon por vidi ion (iun);

ĉirkaŭkolo (= koliero), **ĉirkaŭbrako** (= branceleto, ĉirkaŭo de brako);

ĉirkaŭurbo (= antaŭurbo), **ĉirkaŭurbano** (= ano de la urba ĉirkaŭaĵo);

ĉirkaŭaĵo (= spaco, regiono ĉirkaŭ io) **ekz.** bela ĉirkaŭaĵo de Koszalin;

ĉirkaŭdomo (= troviĝanta ĉirkaŭ domo) **ekz.** ĉirkaŭdoma legomĝardeno.

En la *Proverbaro Esperanta* prilaborita de Ludoviko Zamenhof troviĝas nur tri proverboj kun la prepozicio **ĉirkaŭ**. Jen ili:

- Ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas.
- Saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero.
- Virinojn oni povas ĉirkaŭflatadi kaj ĉirkaŭflirtadi. ❧

Funebre

Travivinte 84-jarojn, novembre 2005 en Zabrze forpasis la aktiva esperantisto

inĝ. Władysław Burszta

Ekde la jaro 1958 post la E-kurso ĉe prof. Żołnierek li partoprenis en renkontiĝoj de esperantistoj en Bytom kaj en Gliwice. Ekde 1984 Li fariĝis estrarano de PEA – Filio en Bytom, kie li gividis E-kursojn. Li estis ankaŭ ĉiĉerono de Esperanto-Turismo.

Ni perdis fervoran kaj plej devigan esperantiston.

**PEA-Filio en Bytom
Łucja Strokosz, Ludmiła
Domzalska, Irena Dronka**



Koszalin

Ekde la unua de oktobro 2005 jaro koŝalina Filio de PEA havas novan retadreson, kun multaj interesaj paĝoj. Sur unu paĝo troviĝas Informilo pri la 28a Ĉebalta Esperantista Printempo, okazonta ĉijare en Mielno. La sama paĝo enhavas ankaŭ aliĝilon, kiun post plenigo oni povas sendi rete al ĈEP-organizantoj.

Ni esperas, ke ĉiuj gesamideanoj havantaj komputilon vizitos nian retejon almenaŭ unufoje.

Jen la nova adreso de koŝalina retejo: www.esperanto.koszalin.pl

Kun koraj kaj varmaj salutoj

Ĉeslavo

Toruń

Esperanto-Societo FLAMO en Toruń anoncas, ke novembre 2005 aperigis la duan, vastigitan kaj ilustritan eldonon de la libro de prof. Józef Toczyski (kaj pri Li), titolitan: „Planado de instrumaterialo en lernejoj, vivkuro, rememoroj”.

La 36-paĝa libro enhavas la titolan eseon pri planado, vivkuron de la konata esperantisto-instruisto de instruistoj de Esperanto en Pollando, ilustraĵojn, fotojn.

Ĝi estas jam la 42a eldonaĵo de la Societo (listo de ĉiuj eldonaĵoj akireblas poŝte).

La libron oni povas aĉeti, skribante al: Esperanto-Societo FLAMO
87-100 Toruń 1, skrytka 16.
(Prezo: 23,60 PLN)

Józef Waliszewski



Estimata Sinjoro Redaktoro!

Pasintjare, forsendante la abonkontizon por la 2005 jaro, mi hezitis kaj dubis pri la senco daŭrigi abonadon de Pola Esperantisto.

Malgraŭ tiuj internaj bremsoj, mi decidis kontinui la abonadon por kaj materiale kaj morale apogi tiun gravan kaj bezonan E-agadon.

Mi eĉ apelaciis al Vi – eltenu ankoraŭ unu jaron – eble okazos iu E-miraklo.

Nu, la jaro 2005 jam preskaŭ finiĝas – E-miraklo ne okazis, la indiferenteco de unuopaj „esperantistoj” kaj E-societoj daŭras, Viaj redakciaj mesaĝoj rebatiĝas kiel pizo de muro, kaj kunlaborantoj plu mankas.[...]

Vi strebas elfroti iun E-fajrero el la kadukiĝanta esperantista restaĵo – nu, mi – kvankam ne kredas – tamen deziras al Vi sukceson.

Kun E-salutoj

[subskribo]



Estimata Sinjoro Redaktoro!

Sinjoro Tomasz Chmielik iom troigas, skribante pri la agonio de pola Esperanto-movado, ĉar danke al ne malgranda aro da lokaj aktivuloj ĝi tamen daŭras, kaj eĉ, kvankam nekontentige, progresas.

Tamen ne ekzistas ombro da dubo, ke la totala, multjara nenionfardo de la gvidantaro de PEA, kiu malzorgas siajn plej fundamentajn devojn estas la ĉefa kaŭzo de la longdaŭra krizo, en kiu troviĝas la plej granda pola E-organizo.

E-movado en Pollando nepre bezonas energian antaŭenpuŝon, sed ĝi neniam okazas, se ni kontentigos nin per la diagnozo de la nuna stato de niaj movadaj aferoj kaj ne ellaboros efikan terapion.

Amike

[subskribo]



Bonan tagon!

Mi skribas al vi, sinjoro, pole, por pli bone esprimi mian nervozan staton. En la 1/2005 numero de PE sinjorino Danuta Żelińska skribas, kiel ni devas ami hundojn, kaj bestojn ĝenerale. Strange!

En urboj loĝas homoj, kaj hundoj en hundejoj. Neniam en la loĝejo de

pensanta homo povas esti fetora besto. Homoj pli ŝatas hodiaŭ hundojn ol naski infanojn, kiuj estas la estonto de la Popolo. Mi havas tri infanojn en 38m² loĝejo. Infanojn oni postulas mortigi, kaj hundoj, je la vivanta Dio – homoj vekigu!

Interese, kiom da infanoj ŝi havas; ŝi neniam plu pri tio skribu [...]

[subskribo]

[red] La tutan leteron ni transodas al s-ino Danuta por eventuala respondo.



Kim J. Henriksen ludis en la pola Granda Orkestro de...

Kim J. Henriksen, muzikisto kaj kantisto konata el 'Esperanto Desperado' kaj 'Amplifiki', plurfoje ludis dum la finalo de la 14a pola Granda Orkestro de la Festtempa Helpo, en kaj apud Krakovo. Tiel, verŝajne unuafoje, E-muziko aperis en koncertoj de tiu famega aranĝo, kune kun la muziko de polaj grupoj.

La Granda Orkestro de la Festtempa Helpo (Wielka Orkiestra Świątecznej Pomocy – WOSP) estas grandega ĉiujara decembra-januarua (kaj verdire ĉiamdaŭra) tutlanda movado de koncertoj kaj aliaj aranĝoj, kies celo estas kolektado de mono por modernaj aparatoj por infanospitaloj. Artistoj kaj ĉiaj organizantoj aktivas en WOSP senhonorarie. La aranĝo estas konata al, kaj varmkore subtenata de multaj homoj.

Maria Majerczak